

EL POPOLA ĈINIO



193
Studentoj de la Sudĉinia Agrikultura
Kolegio lernas direkti traktorojn

Sep.-9
1953

Heroa Koreio, Bela Koreio

Ljoŭ Baj-ju*

Dum tri jaroj kaj tridek-tri tagoj Koreio estis simila al granda vulkano. Tien sin fokusiĝis la okuloj de la tutmonda popolo kaj iliaj koroj bolis de kolero. Hodiaŭ la sono de pafiloj subite ĉesis ĉe la fronto. Lamp-lumoj aperis kiel tiel multaj floroj. Kiam niaj batalantoj iris el la kotplenaj tranĉeoj kaj koreaj patrinoj ridetis je la unuaj signoj de la tagiĝo de paco, mi meditis pri grava problemo: Kio estas tiu forto kiu savis pacon el la detruema fajro de milito? Kio estas tio kio pruviĝis eĉ pli forta ol ŝtalo kaj pulve? Mi pensis pri Koreio, heroa kaj bela Koreio.

La Usonaj agresantoj intencis sufoki Koreion en sango kaj fajro. Mi mem vidis ke estas eĉ ne unu sola vilaĝo kiu ne estas reduktita al cindroj kaj estas eĉ ne unu colo da tero kiu ne estas saturita de sango. Kaj la cindroj ankoraŭ brulis kaj la sango fluas. Kion vi pripensas kiam vi staras antaŭ tiuj furiozantaj fajroj? Unu penso konstante venis al mia cerbo: Unu plenumo da tero el la lando de Koreio sufiĉas por pruvi la krimojn de tiuj ĉi agresantoj.

Mi neniam forgesos la vortojn de la maljuna patrino de Kang Bok Su, abund-rikolta modela terkulturistino de Jonghŭo-distrikto, Anĵu. Ŝi diris al mi, "Miaj filoj estis bonaj kaj fidelaj kaj superis aliajn ne nur en terkulturado sed ankaŭ en lernado. Ili ĉiuj estis mortigitaj de la senkompata malamiko. Mia pliaĝa filo mortis kiel vera heroo. Antaŭ ol li faris sian lastan spiron, li enterigis sian partian karton kiun li taksis pli valora ol sia vivo kaj kiun li neniel volis forlasi en la manon de la malamiko. Mia dua filo ankaŭ ne cedis sin al la malamiko. Ili mortpafis lin sur placo en Sunĉon. La kuglo iris tra lia brusto, sed li eĉ ne sangis. Mi trenis lian kadavron hejmen, kaj kiam mi rigardis lian vizaĝon, ŝajnis ke li ankoraŭ havas ion por diri al mi..." Ĉu tiu maljuna virino nur volis sciigi al mi sian malĝojon kiam larmoj kuris sur ŝiajn sulkajn vangojn? Ne! Ŝi estis esprimanta sian malamon kaj la malamon de la tuta korea popolo kontraŭ la malamiko. Estis tiu nekvietegbla malamo kiu subtenis la fortan kaj heroan reziston de la korea popolo.

Popolo kun Klara Konscienco

Vidaĵoj kiel tiu ĉi rememorigis min pri Li Ĵung Sung, ĝentila gerilbatalantino, kiu iam diris al mi pri tiuj bravaj viroj kaj virinoj: "Unuvorte, iliaj agoj estis ĉiuj pro la simpla fakto ke ili havas klaran konsciencon."

Estis ĝuste tiu ĉi klara konscienco de popolo decideme defendanta pacon kaj justecon, kiu faris la korean popolon pli kaj pli horea kaj bela dum la milito. Kim Gun Suk, simpla kaj modesta mezlerneja studento de Taegu diris al mi ke ŝi mortigis pli ol tridek malamikajn soldatojn. Kvankam ŝi estis ankoraŭ tre juna, ŝi estis nomita de ĉiuj siaj gekamaradoj "Patrino de la Gerilanoj." Mi rememoras Pak Liong Sik, tiu bela knabo kiun mi renkontis sur la orienta marbordo de Koreio. Li tenis sian fusilon en siaj brakoj dum ni interparolis. Li diris ke lia ŝatata leciono en lernejo estis biologio sed nun li devas pafi tiujn du-krurajn bestojn kiuj estis minaco al homaro. Do, kiam vi konis tiajn homojn, ne estis malfacile kompreni kial ĉe la fronto, kiam ponto estis eksplodigita kaj kiam la malamiko daŭrigis senĉesan pafadon super ĝi, la koreaj

batalantoj povis defie ĵuri: "Se ni ne sukcesas ripari la ponton, do lasu niajn kadavrojn ĝin subteni!" Ili kuris antaŭen. Tiuj ĉe la antaŭo pafis sub la malamika pafado sed la aliaj kiuj sekvis sentime sin ĵetis antaŭen. Eĉ kiam ili estis mortigitaj, ili sin tenadis je la ponto tiel ke iliaj kamaradoj povis transiri la riveron pere de iliaj kadavroj.

Kaj ĉi tie estas alia rakonto. Kim Sung Un estis juna riparisto en koton-ŝpinejo en Pakĉon. Lia infanaĝo estis plena de mizero; fiŝante ĉe maro, lia patro estis mortigita de japanaj imperiistoj kiuj tenis Koreion sub sia fera kalkanumo. Kim Sung Un ekkonis kio ĝojo estas nur post la liberigo de Norda Koreio. Li ofte superplenumis sian produkt-kvoton. Li ĉatis dancadon kaj kantadon; lia ŝatata kanto estis *La Koton-kolekta Knabino*. Li subskribis la Stokholman Pacalvokon ĉar li pasie amis vivon. Sed milito subite venis. Kiam li vidis ke la maŝinoj kiujn li riparis per siaj propraj manoj estas bruligitaj kaj falintaj teren kune kun la tuta fabriko, li ne plu povis tion toleri. Kim Ĵung Ok, laboristino de tiu fabriko, diris al li: "Estas bone ke vi iru! Lasu la ripar-laboron al mi."

Li fariĝis kontraŭ-aerataka kanonisto ĉe la fronto kaj ne timis defii malamikajn aeroplanojn. Kiam li ekvidis malamikan aeroplanon venantan en lian direkton, li kuraĝe staris tie kaj lasis ĝin plungi kontraŭ li antaŭ ol li trankvile faligis ĝin teren. Li trovis ĝojon precipe en faligo de tiuj malbenitaj aeroplanoj. Vidante sian hejmlandon flamanta, li ĵuris kun angoro en sia koro: "Mi estas koreo. Mi verŝos mian lastan guton da sango por mia patrio." Tio estis la solena proklamo de la korea popolo kiam la agresantoj frenezis en hombuĉado dum sia momento de triumfo. Kim Sung Un faligis tiel multe da aeroplanoj ke li baldaŭ kreis rekordon kiu donis al li la honoran titolon, "Heroo de la Korea Demokrata Popola Respubliko."

Sur la batalejo Kim Sung Un iam sciigis al mi la plej novan informon pri la koton-ŝpinejo. Li diris ke lia amikino Kim Ĵung Ok jam akiris labormedalon pro sia kreo de la rekordo teksi 63 metrojn da ŝtofo po tago sub la plej malfacilaj kondiĉoj. Tiuj heroaj popolanoj, kiuj estis ĉiam sentimaj antaŭ la ŝtormo de ŝtalo kaj eksplodanta pulvo, staris firme kvazaŭ monto kaj maturiĝis kaj fariĝis pli kaj pli fortaj meze de la milito.

La lando de Koreio estas bone konata pro sia beleco. Eĉ kiam mi skribas ĉi tion, mi povas rememori la matenajn pejzaĝojn de Koreio en printempo, kun la argenta nebulo malalte pendanta, la blujaj riveretoj kviete fluantaj kaj ruĝaj akacioj freŝe florantaj sur la montaro kaj kamparo. Kaj ankaŭ estas tiuj riz-kampoj sukplene verdaj!

Virinoj de Koreio

Sur tiu fekunda kamparo mi renkontis kamparaninon nomitan Jun Tae Hong. Portante puran blankan jupon kaj kun ruĝstela insigno de honoro alpinglita sur ŝia brusto ŝi estis veturiganta bovo-ĉaron hejmen, reportante la kadavron de sia parenco el la hospitalo ĉe la fronto. Ŝia koro estis plena de angoro sed ŝi ne ĝin elmontris. El sia perdo ŝi akiris unikan forton per kiu ŝi plugis proksimume kvin akrojn da tero per si mem.

Dum ŝi laboris, ŝi havis deziron en sia koro: "Mi deziras ke ĉiu turbulo kiun mi levas fariĝu kuglo kiu flugos al la fronto kaj donos baton al la malamiko." Ŝia laboro ricevis riĉan rekompencan. Ŝi sukcesis alporti abundan rikolton por sia patrujo.

En Koreio estas dekoj da miloj da virinoj similaj al Jun Tae Hong. Estis Kang Bok Su, la filino de la maljunulino kiun mi menciis supre; kaj estis Kim Ĉun Sik, kiu kutimis porti bluan bluzon, kaj la bela Kim Tam Suk. Ja estis multaj aliaj kiuj semis tritikon en printempo eĉ en kuglokaĵoj kaj riparigis digojn malgraŭ torentoj en peĉe malluma nokto. Jes, ĉiu familio en Koreio estis frapita per doloro kaj profunda malĝojo. Sed ĉu iam okazis ke tia malĝojo ne ŝanĝiĝis en forton? Tiuj koreaj virinoj sciis ke ili paŝas sur tero saturita per la sango de siaj proksimaj parencoj; ili sciis ke la sango verŝita sur tiu tero subtenas kaj ebligas la kreskadon de la junaj kreskaĵoj. Kvankam la fajro de milito furiozis tagon kaj nokton, tiuj diligentaj kaj harditaj terkulturistinoj neniam ĉesis kuraci la vundojn de sia patrujo per pli abundaj kaj grandaj rikoltoj.

Kiuj estas la venkantoj en Koreio? La agresantoj aŭ tiuj kiuj batalis kontraŭ agreso? Kiuj estas tiuj kiuj havas pacan konscion kaj al kiuj la patrinoj de la mondo esprimas sian amon kaj dankon? Kaj kiuj estas tiuj kiuj estos ĉiam forpuŝataj kaj malestimataj de la popoloj de la mondo? La kunkrimuloj de Hitler nur konfesis siajn krimojn antaŭ la pacamaj popoloj dum juĝado en Nuremberg, sed Floyd B. O'Neal, subleŭtenanto en la Usona Aer-forta Rezervo, faris sian ateston tuj post sia kaptiĝo fare de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj en Koreio. Li diris:

...Kiam mi pensas pri mia estonteco, kiam mi pensas pri la tago, kvankam mi ne edziĝis sed tion mi intencas, kiam mia filo demandas min kion mi faris en Koreio, kiel mi povas diri al li ke mi venis ĉi tien kaj faligis bakteri-bombojn sur popolon disemante morton kaj detruon? Kiel mi povas reiri kaj alviziĝi mian familion en civilizita mondo? Kiel mi povas sciigi al ili tion ke mi, mi estas krimulo en la okuloj de la homaro...

Niaj popolanoj, la herooj koreoj kaj la bravaj Ĉinaj Popolaj Volontuloj, estas grandaj popolanoj. Mi vidis Koreion leviganta sentime meze de furiozantaj flamoj kaj marŝanta antaŭen en la ruĝiganta lumo de tagiĝo. Tiu ĉi milito, milito defendanta pacon kaj justecon, faris Koreion, landon de nobla, hardita, diligenta kaj modesta popolo, pli heroo kaj pli bela ol antaŭe. Dum sia marŝo antaŭen, la korea popolo nemezureble riĉigis la belajn moralokvalitojn. Vere ili simbolas noblan idealon kaj subliman esperon.

Heroa Urbo

Kiam mi parolas pri tiu ĉi granda espero, mi ne povas ne menci la heroan urbon Pjongjang. Kiam la milito estis daŭranta, la popoloj de Sovetio, Ĉinio kaj, fakte, ĉiu parto de la mondo, sendis sian bonvolon kaj ardan subtenon al Pjongjang kaj metis en ĝin sian korean esperon. Estis Pjongjang en tiu severa vintro, kiam la ŝajne senĉesaj eksplod-briloj lumigis la vintran nokton, kiam la stratoj estis supersutitaj per ruboj kaj ruinaĵoj, ke mi ekaŭdis alvokon el la koroj de herooj kaj trovis la esperon de la estonteco.

Marŝalo Kim Il Sung kaj liaj intimaj batalkamaradoj restadis en Pjongjang tra la tuta periodo de milito. Tie li planis surpriz-atakojn kaj kontraŭ-ofensivojn kontraŭ la malamiko. Tie li optimisme atendis la novaĵon de venko. En Pjongjang mi renkontis Pak Den Aj, perfekta simbolo de la klara konscienco de la korea popolo. Ŝi diris al mi: "Tio kion ni deziras estas patrujo kie regas paco." Mi ankoraŭ vivece memoras tiun tagon kiam mi kaj Pak Ĉang Ok, unu el la gvidantoj de la korea Nodong-dang, staris ekster subtera ĉambro, rigardante la kavigitajn stratojn kaj domojn en la tremanta brilo de la subiranta suno. Subite li sin turnis al mi kaj diris kun profunda sento: "Kiam mi staras ĉi tie, kiel mi ofte tion faras, rigardante la detruitan urbon de Pjongjang, mi ne povas ne pensi pri la estonteco, ekzemple, kiam straton ni konstruos ĉi tie. Ah, ni konstruos novan Pjongjang, ĝuste kiel ni volos..." Dum li diris tion, li ridetis, kvazaŭ dirante: "Ĉu vi pensas ke mi rigardas tro malproksimen?"

Jes, eĉ kiam la agresantoj ankoraŭ sovaĝe verŝis malsupren hajlon da bruligaj bomboj, eĉ kiam la popolo ankoraŭ falis en lageton da sango, mi povis vidi la necedeman, optimistan kaj batalan spiriton de la korea nacio. Mi sciis ke triumfo apartenas nur al tiu popolo kiu neniam plendas nek sin returnas en sia batalo por justeco, kiu fidis al la estonteco kaj fordonas ĉion por ĝi.

La estonteco kiun ni esperis jam fariĝis la estonteco, kaj la unuaj lum-strioj de la tagiĝo de paco brilas super la lando de Koreio. Ni devas neniam forgesi ke tiu ĉi paco estis gajnita de la heroo korea popolo kiu batalis neŝanceligante pli ol tri jarojn kaj suferis grandegan perdon de vivoj. La korea popolo defendis pacon je la kosto de granda malĝojo; ili savis ĝin el la milit-fajro kaj ili estas nun subtenanta ĝin antaŭ la popoloj de la tuta mondo. Ni ne devas forgesi ke estas nia devo gardi decideme tiun ĉi pacon, tiel ke, kun ĝi bela mateno lumiĝos super tiu ĉi mondo.

Nun paco jam venis, ni aklamu al Koreio dum ni marŝas antaŭen ŝultro-ĉe-ŝultre en defendo de mondpaco. Koreio! Triumfanta Koreio! Heroa kaj bela Koreio!

* Ljoŝ Baj-ju, fama verkisto kaj milit-korespondanto, revenis antaŭ nelonge el Koreio. Li partoprenis la faradon de la filmo "Venko de la Ĉina Popolo" kiel literatura konsilanto, pro kio li ricevis Stalin-premion.

Koreaj popolaj reprezentantoj prezentas bukedojn kaj standardojn al unuo de sia armeo okaze de la 5-a datreveno de la fondiĝo de la Korea Popola Armeo.



Digo de Kunbatalanta Amikeco

Ŝjaŭ Ĉjoŭ-fej

Nova, granda digo staras trans la rivero Kokcancen norde de la vilaĝo Cemiltong de Jong'anli-distrikto, Kokcangun-gubernio, Koreio. Sur la kluzpordo de la digo staras monumento kun la skribo "Digo de Kunbatalanta Amikeco" en la ĉina kaj korea lingvoj kaj sur ĝia dorso troviĝas la vortoj: "Tiu ĉi monumento estas dediĉita al la ĉinaj volontuloj kiuj konstruis la digon por memori ilian rimarkindan faron."

Tiu ĉi fortika digo estas konstruita de iu taĉmento de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj por la tieaj koreaj popoloj.

Kokcancen estas rivero kiu ofte superfluis dum pluvaj sezonoj kaj inundis la kampojn sur siaj ambaŭ bordoj forlavante ĉiujn plantaĵojn. Dum pluvomankaj sezonoj la riverakvo malpliĝis tiel ke al la rizkampoj surbordaj mankis akvo por irigacio. Tial la konstruo de tia fortika digo trans tiu ĉi rivero estis la kelkdek-jara deziro de la pli ol mil sescent loĝantoj de tiu ĉi regiono. "Dum la jaroj de japana imperiista regado," diris la maljunuloj, "la popolo deziris konstrui digon, sed neniu zorgis pri la konstruado." Nelonge post la liberigo alvenis la Usona imperiismo, kaj multe da junulaj kaj mezaĝaj viroj iris al la fronto por defendi sian patrolandon. Per sia tuta forto la restantaj virinoj, maljunuloj kaj malfortuloj ĉiuprintempe povis konstrui nur portempan digon por plenumi semadon, sed kiam alvenis la pluvsezono kaj la mont-akvo torrentis malsupren la grenkreskaĵoj ankoraŭ estis forlavitaj.

Jen venis la printempo de 1953. Por la loĝantoj de tie ĉi tio kio tuŝis iliajn korojn ne estis la varmeco de printempo sed la ĉagreno pri la neebleco de rizplanto pro manko de digo. Kim Ĉi Hŭa, familiano de popola armeano, kun trijara infano en siaj brakoj larme diris al si mem antaŭ sia tero:

"Bedaŭron al vi, ĉijare ne eblas rizplanto!"

Post kelkaj tagoj, taĉmento de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj atingis tiun lokon de la fronto. Eksciinte pri la situacio oni tuj decidis konstrui transriveran digon por solvi la gravan kaj urĝan problemon kiu koncernis la vivon de pli ol mil sescent popoloj. La gvidanta instanco de la taĉmento, post esplorado kaj planado, decidis entrepreni akvokonservan laboron tie por la longdaŭraj interesoj de la korea popolo. La konstruaĵo



Junaj kamparaninoj disdonas boligitan akvon al la fervore laborantaj batalantoj.

konsistis el fiksa digo, akvo-disiga digo, akvokonduka digo kaj irigacia kanalo. Aŭdinte pri tio la ĉinaj volontuloj estis en granda entuziasmo. Ili tuj faris per si mem multajn ilojn por la konstrua laboro. Je la Internacia Labortago, la Unua de Majo, la konstruado komenciĝis.

Por fini pli frue la konstruadon kaj provizi ĝustatempe akvon por printempa plugado, ĉiuj batalantoj laboris tre vigle kaj energie. Eĉ neniu ĝemetis kiam la ŝultroj ŝvelis pro peza ŝarĝo aŭ la manoj aŭ piedoj sangis pro vundoj. Jang Sjoŭ-ming, batalanto kun duaklasa merit-ordeno, ellitiĝis por transporti ŝtonegojn tuj post atako de malario. Dum la mateno kiam la akvo-disiga digo estis konstruita, oni devis labori en osto-tranĉa, glacie malvarmega akvo unu metron profunda. Batalanto Ĉen Ven-ljang estis la unua kiu sin prezentis por tiu laboro. "Nia volontulo Lo Ŝeng-ĝjaŭ saltis en glacian kavon en vintra tago por savi korean knabon Cuj Jeng; nun ni laboras por la feliĉo de mil sescent koreaj popoloj, kaj glacio ja ne troviĝas en la rivero, 'do kion timi?'" Tion dirinte, li demetis siajn vestojn kaj saltis en la akvon. Lin sekvante, la aliaj ensaltis unu post la alia. Ilia haŭto ruĝiĝis pro la ega malvarmeco sed ili persiste daŭrigis la laboron kaj neniu forlasis la akvon.

Kiam disvastiĝis la novaĵo pri la komenco de tiu konstruado, la koreaj popoloj loĝantaj en la kvin vilaĝoj sur ambaŭ bordoj de Kokcancen-rivero amase

iris al la laborkampo. Junaj kamparaninoj arope ĉeestis tie, kaj el ili iuj portis ŝtonegojn surkape, dum aliaj akvositelojn disdonante trinkakvon tason post taso al la fervore laborantaj batalantoj. La prezidantoj de la gubernia kaj distrikta komitatoj restis por la tuta tago sur la konstruejo, gvidante kelkdek gelernantojn labori kune kun la batalantoj. Dum ripozo virinoj kaj geknaboj amuzis la batalantojn per kantado kaj dancado. Kiam la koreaj virinoj kantis "Oriente Ruĝas Sun", la volontuloj respondis per "Kanto de Kim Il Sung." Maljunuloj kun bastonoj venis kaj jen rigardis ĉi tion, jen palpis tion. Sur iliaj sulkoplenaj vizaĝoj brilis rideto de feliĉo. Kim Heng Jong, okdekkvar-jarulo kiu jam tri jarojn ne eliris el sia domo, nun tiel ĝojis ke la tutan

de la Volontuloj kaj ĝojkrioj "Vivu Prezidanto Maŭ Ze-tung" kaj "Vivu Marŝalo Kim Il Sung", la prezidanto de la gubernio tranĉis la inaŭguran rubandon, la reprezentanto de la volontula trupo malfermis la kluzpordon kaj torenta akvo tuj elfluegis tra la kluzpordo al la kanalo. Post du horoj la sekegaj rizkampoj jam pleniĝis per blanke brilanta akvo. Koreaj avoj, avinoj, junaj fraŭlinoj kaj virinoj freneze klakigis siajn manojn kaj emociiĝis ĝis larmoj; granda grupo da geknaboj kurante sekvis la fluantan akvon por pli ol unu li-o. Kiam la klakado ĉesis, pli ol tricent koreaj virinoj kun floroj enmane kuris al la trupo kaj oferis bukedon al ĉiu batalanto. Poste, ĉiuj sidiĝis sur la vasta herbejo kaj ĝuis la naŭ-programeran prezentadon de la kamparana dramo-trupo. Sesdek-naŭ-jara avo Ŝen Kil Sun, kiu jam por dek kelkaj jaroj ne dancis, dancis la unua. Li emociplene gvidis la amasan dancon, kaj sekvis lin ĉiuj avoj, knabinetoj, kadroj kaj batalantoj de la trupo. Ĉiuj kune celebris la naskiĝon de la "Digo de Kunbatalanta Amikeco."

Sesdeknaŭ-jara avo Ŝen Kil Sun dancis la unua.



nokton li ne povis bone dormi kaj en la frumateno, post matenmanĝo, iris kun apogbastono al la laborloko malgraŭ sia malforteco—li nepre deziris vidi la ĉinajn volontulojn. Atinginte la lokon, li frapetis ĝojege iun batalanton je la ŝultro: "Kiel pene vi laboras, miaj knaboj! Mi jam vivis okdek kvar jarojn, sed mi neniam atendis ke tiom multe da ĉinaj knaboj konstruos digon por ni. Jen mia kelkdek-jara espero realiĝas dank' al via klopodo." Alia maljunuloj, sesdeknaŭ-jara avo Kang Mun Jeng, kiu loĝas ĝuste apud tiu digo, sentis sin neeldireble ĝoja kiam li vidis la tago-post-tagan progreson de la konstrulaboro. Ĉiumatene li fiĝis sidante ĉe la riverbordo. Reveninte hejmen, li fritis la kaptitajn fiŝojn kaj donacis ilin al la volontuloj. La batalantoj tiel kortuŝiĝis ke ili ne trovis vortojn por esprimi sian dankon.


Ekstreme rapide la laboro sin puŝis antaŭen. Je la naŭa de majo jam triumfe finkonstruiĝis la digo. Tiun tagon je la kvara posttagmeze, en la ĉeesto de la volontula taĉmento, okazis grava inaŭgura ceremonio kiun partoprenis pli ol sescent homoj. Meze de kantado de la Batalkanto

La rapida finkonstruo de la digo alportas feliĉon al la pli ol mil sescent loĝantoj en la kvin vilaĝoj najbare de Cemiltong. Ĉi alportas novan vivon al la cent mil pjung-ojn* da rizkampo. La vilaĝanoj ekscitiĝis pro la ekzisto de tiu fortika digo, ili neniam plu ĉagrenos sin pri la plantado de rizo. Nun inter la tieaj popolanoj disvastiĝas jena diro:

"Profunda estas la amo de la Volontuloj kiel la Orienta Maro, granda kiel la Naŭ-pinta Monto. La rimarkindan faron de la Volontuloj ni ĉiam memoras en la koro."

* Unu "pjung-o" = 0.03306 aro.

La konstruiĝo de la digo alporti novan vivon al la cent mil pjung-oj da rizkampo.



Tra Nordokcidenta Ĉinio


Ĉe Mu-ĉi

Antaŭ ne longe mi veturis laŭ la granda nordokcidenta vojo de Ĉinio, de la fervoja fino ĉe Lanĉoŭ, preterirante kie la fervoj-konstruantoj estis konstruantaj la novan linion de Lanĉoŭ al Sinkiang laŭ la antikva Silka Vojo. La vojo etendiĝas kelkdek kilometrojn rekte nordokcidenten, preter la okcidenta ekstremo de ĉina Granda Muro ĉe Ĝjaju Ĝŭan—ĉi tie nur malimponaj ruinoj de remparo. Maldekstre de ni dum multtaga vojaĝado altis la neĝokovritaj pintoj de Ĉiljen-montaro, plejparte vualita en blankaj nebulo kaj nuboj. Plejparto de la vojo kuŝas sur senfruktaj ebenejoj kaj montetoj, mortaj fingroj de Gobi-dezerto.

La tero estas nuda, kaj montdeklivoj kaj dezerto, sur ĉi tiu altebenejo kiu staras meznombre 3,000 metrojn super marnivelo. Nur tie kaj ĉi tie sin trovas areoj kulturitaj apud fontoj kaj riveroj kun urbetoj malgrandaj. Sed hodiaŭ la vojo estas pli trafikplena ol iam ajn en la pasinteco. Ĉiutage kolonoj da ŝarĝaŭtoj transportas ole-produktaĵojn de Jumen. En la antikvaj tagoj—la tagoj kiam Marko Polo priskribis ĝin—ĝin iris nur la maloftaj kamel-karavanoj portantaj komercaĵojn al kaj el Ĉinio tra Centra Azio al Hindio, la Meza Oriento kaj Eŭropo. Ĝi estis la vojo tra kiu la ĉina silko estis transportita al Romo kaj la Okcidento antaŭ la Krista epoko. Ĝi estis la vojo tra kiu la monaĥo Tripitaka portis la budaismajn sanktajn skribojn el Hindio.

Hodiaŭ la vojo estas la vivlinio de la Nordokcidenta Administra Regiono de Ĉinio. Ĝi ligas disajn urbetojn kaj nomadajn kolonietojn de hanoj, ujvuroj, uzbekoj, kazakoj, mongoloj, tibetanoj kaj multaj aliaj popoloj. Ĝi tra- aŭ ĉirkaŭ-iras ĉiujn kvin provincojn de la regiono:

Ĝŭanglangho-ponto estas unu el la grandaj projektadoj konstruataj ĉi-jare sur Lanĉoŭ-Sinkiang-a Fervojo.



Ŝensi, Kansu, Ningŝia, Ĉinghaj, Sinkiang, kaj la tri specialajn municipojn Sian, Lanĉoŭ kaj Tihŭa. Ĝi estas vojo de komercaj-karavanoj de ŝarĝaŭtoj, ŝarĝ-ĉevaloj aŭ kameloj portantaj sekigitajn vinberojn, famajn Hamimelonojn el Sinkiang, oleon el Kansu, lanon el Ĉinghaj kaj interŝanĝe, grenojn, teon kaj la produktaĵojn el industriaj centroj de la lando—fabrikaĵojn kaj nun, pli kaj pli da maŝinoj kaj konstru-materialoj.

Nun al survoja trafiko aldoniĝis la aerlinioj de la Ĉina-Sovetiaj Civilaj Aviadaj Aerlinioj laŭ la vojo de Pekino, Sian, Lanĉoŭ, Tihŭa, Alma-ata kaj fervojo etendiĝanta konstante tagon post tago sur la distanco de 2,000 kilometroj de Lanĉoŭ al Tihŭa.

Trezoro-serĉantoj

Dum la aŭtomobilo rapidis antaŭen muĝante kun nubo da Gobi-polvo post si, mia kunveturanto, sidis alte sur amaso de malplenaj ole-bareloj, sorĉite de ĉiu trajto de la vojo. Li estis la estro de ole-esplora teamo. Li parolis kun granda ĝojo: "La sovaĝejo estas mia hejmo kaj mi ĝin tre ŝatas. Kiam ni trovos oleon, nova ole-urbo leviĝos sur la altebenejo. Tiam mi denove foriros por trovi ankoraŭ pli multe da oleo."

Esplorinte en la mongola distrikto en Ningŝia-provinco, poste en la de tibetanoj loĝataj stepoj en Ĉinghaj-provinco, nun li estis veturanta al Jumen-olekampo.

Grandskala esplorado antaŭeniras en la Nordokcidento. Mi renkontis multajn grupojn de geologoj, energiaj junuloj venantaj el Gobi-dezerto sur kamel-dorso, aŭ piedirantaj en la montojn, spite ĉiujn rigorojn de la Nordokcidenta severa kontinenta klimato. Ilia kampo estas la granda areo de la U-forma kurbo de la Flava Rivero al la plej okcidenta limo de Ĉinio.

Sin trovas dek grandaj geologiaj teamoj kaj 52 ole-esploraj teamoj nun en la provincoj Ŝensi, Kansu, Ningŝia kaj Sinkiang, serĉantaj mineralojn kaj petrolon.

Nordokcidenta Ĉinio jam de longe famas pro siaj riĉfontoj de mineraloj, sed la Kuomintanga registaro neniam sin ĝenis per detala esplorado. Sub la Popola Registaro, en la pasintaj tri jaroj geologiaj teamoj jam priexploris pli ol 46,000 kvadratajn kilometrojn en la Nordokcidento. Ilia drilado entute atingis pli ol 33,000 metrojn. Petrolo, karbo, fero kaj salo estas malkaŝitaj en abundeco; tiaj ne-feraj metaloj kiaj mangano, tungsteno, bismuto, berilio kaj zinko estas ankaŭ malkovritaj. Abunda provizo de kupro malkaŝiĝis proksime de

Lanĉoŭ. Norda Ŝensi-provinco kaj la provincoj Kansu kaj Sinkiang havas multe pli riĉan ole-provizon ol la antaŭe taksita. Kampoj situas sur ambaŭ flankoj de la Tienŝan-montaro. Nun la Nordokcidenta provizo estas, laŭ onidiro, la plej granda en la lando.

Tiu ĉi grandskala, sistema esplorado de minerala provizo kaj akva povo pavimas la vojon por la industriigo de la Nordokcidento.

Nova Epoko por la Nordokcidento

Sub la Kuomintangaj militaristoj, la Nordokcidento longtempe estis ekspluatata senkompatate, jetita en malriĉecon kaj intermortigan bataladon. Vojaĝo estis riska entrepreno. Ĉiuj karavanoj estis armitaj. Por la ordinara homo eĉ sin vivteni estis sufiĉe malfacile. Kompreneble industriigo estis nur sonĝo.

Liberigo tuj detruis la malnovan Kuomintangan militaristan sistemon. La agrara reformo (efektivigita nur en parto de la regionoj loĝataj de naci-minoritatoj, sed en ĉiuj regionoj loĝataj de hanoj) kaj diversaj rimedoj de helpo fare de la registaro jam estigis kompletan transformiĝon en la vivo de la popolo.

La Nordokcidento kontribuas al la nacia ekonomio ĉefe per siaj mastrumadoj agrikultura kaj dombesta. Ĝiaj malgranda moderna industrio kaj manfaradoj ankoraŭ nur konsistigas 5 procentojn de sia ekonomia riĉo. Agrikulturo estas la ĉefa fonto de la vivrimedo de la popolo. Tritiko kaj kotono estas la ĉefaj produktaĵoj. Ili centriĝas en Ŝensi, orienta kaj okcidenta Kansu, Ĉinghaj, sur la bordoj de la Flava Rivero en Ningŝia, kaj en suda Sinkiang. La gren-rikolto en 1952 estis proksimume 25 procentojn super tiu de 1949.

Bredado de dombestoj okupas la duan pozicion en graveco. Ĝi centriĝas en Ningŝia, suda Ĉinghaj, sudokcidenta Kansu kaj norda Sinkiang. La brut-kulturistoj bredas bonajn dombestojn, kamelojn, ĉevalojn kaj ŝafojn.

Post-liberiga progreso estas rapida. En la regionoj kie la popolanoj ekskluzive sin okupas je brut-bredado la nombro de brutoj ĉiuspecaj en 1952 estis pli ol duobligita kompare kun tiu de 1949. Ĉinghaj produktis 60 procentojn pli da lano ol antaŭ la liberigo.

Nuntempe la disvolviĝo de brut-bredado estas la ĉefa tasko de la regiono, sed disvolviĝo ekonomia antaŭenmarŝas kun rapideco en multaj kampoj. Ekde 1950 la registaro investis, en tiu regiono, proksimume 6-oble pli da kapitalo ol la originala. Kvarono de la investo venis rekte de la ŝtataj entreprenoj. Signoj de progreso estas klare videblaj laŭ la vojo al Sinkiang. Mi vidis ole-rafinejojn, elektrejojn, kotonaj-fabrikojn, farun-muelejojn, karbminejojn, alumet-fabrikojn kaj

malgrandajn inĝenierajn laborejojn en Sian, Baŭĝi, Lanĉoŭ kaj Tihŭa kaj multajn novajn fabrikojn konstruatajn. Aŭtomobila komunikado estas konstante ekspansiigata por plibonigi transportadon. Radio, telegrafo kaj poŝto interligas la plej malproksimajn centrojn.

La tuta Nordokcidento staras ĉe la sojlo de la plej granda periodo de politika, ekonomia, socia kaj kultura disvolviĝo en sia longa historio.

Sur la Lanĉoŭ-Sinkiang Fervojo

La Tienŝuj-Lanĉoŭa sekcio de la Lunghaj-fervojo malfarmigis al regula trafiko kaj la konstruado de la Lanĉoŭ-Sinkiang Fervojo estas jam en glata progreso.

Nun vi povas vojaĝi fervoje de la stacio 86 kilometrojn okcidente de Lanĉoŭ tra Tienŝuj, Baŭĝi kaj Sian, al Ĉingtaŭ, la plej granda havenurbo de Ŝantung-provinco. Ĝi estas la plej longa fervojlinio orient-okcidenta traŭranta regionojn de vasta loĝantaro kaj diversaj naturaj riĉaĵoj kaj ligita per fervojo kun Nordorienta kaj Orienta Ĉinio, Norda kaj Centra-Suda kaj Suda Ĉinio. Baŭĝi estos la komencejo de la Baŭĝi-Ĉengtu-a Fervojo, kiu interligos ĝin kun Sud-okcidenta Ĉinio.

Sur la vojo al Uŝjaŭ-montopinto, mi vidis dekojn da miloj da fervoj-laboristoj konstruataj vojojn, pontojn kaj trapasejojn en la montoj. Ĉe la konstruejo de ponto trans iu valo estas grandaj ekskavatoroj, arganoj kaj cemento-miksiloj, "la peza artilerio de industria konstruado." Ŝtalaj traboj, ligno kaj cemento estas tien ĉi transportataj. Novaj domoj por laboristoj staras en la ombro de la neĝokovrata monto.

Estis granda tago por la naci-minoritataj popolanoj kiam la fervojo venis al Lanĉoŭ. Ili okazigis kolorriĉajn celebroy informiĝinte ke konstruado de la Lanĉoŭ-Sinkiang linio jam komenciĝis. Lanĉoŭ, antaŭe bazo de kie la malnova reĝimo sklavigis politike kaj ekonomie la naci-minoritatajn popolojn, estas nun centro el kie kulturo kaj komerco radias tra la tuta regiono. La medicinaj teamoj kaj diversaj delegacioj senditaj de la Centra Popola Registaro al la naci-minoritataj regionoj trairas ĝin kaj, siavice, la reprezentantoj de la naci-minoritataj popoloj vizitas Pekinon kaj aliajn regionojn.


Estis granda tago por la naci-minoritataj popolanoj kiam la fervojo venis al Lanĉoŭ. Ili okazigis kolorriĉajn celebroy informiĝinte ke konstruado de la Lanĉoŭ-Sinkiang linio jam komenciĝis. Lanĉoŭ, antaŭe bazo de kie la malnova reĝimo sklavigis politike kaj ekonomie la naci-minoritatajn popolojn, estas nun centro el kie kulturo kaj komerco radias tra la tuta regiono. La medicinaj teamoj kaj diversaj delegacioj senditaj de la Centra Popola Registaro al la naci-minoritataj regionoj trairas ĝin kaj, siavice, la reprezentantoj de la naci-minoritataj popoloj vizitas Pekinon kaj aliajn regionojn.

Paco inter la Nacioj

Sur la stratoj de Lanĉoŭ mi vidis minoritatajn popolanojn el multaj nacioj: ujuvuraj knabinoj kun brunaj okuloj kaj longaj harplektaĵoj pendantaj ĝistalie; mongolaj ĉevalistoj en siaj belaj roboj kaj ledaj altaj botoj; kaj Tibetaj virinoj kiuj ornamas sian hararon per agato kaj portas juvelzonojn.

Kvankam la Nordokcidento enhavas preskaŭ 33 procentojn de la tuta areo de Ĉinio kaj estas la plej granda

(daŭrigo sur p. 200)



Borado por oleo en la Nordokcidento

En la primitiva arbaro de unu el la plej grandaj arbar-regionoj de Ĉinio—la Granda Ĥingan-montaro, fervojo estos konstruita. Post la kompletigo de tiu ĉi fervojo, la grandkvanta provizo de bona ligno en tiu ĉi senlima primitiva arbaro povos esti transportita al ĉiu parto de la lando.

La primitiva arbaro de la Granda Ĥingan-montaro lokiĝas en la ekstrema nordo de Ĉinio, ĉe 52° norda latitudo, kaj ankaŭ estas la plej alta regiono de Nord-orienta Ĉinio. 1400 metrojn super la marnivelo. En la plej malvarma tago en vintro la temperaturo falas ĝis ĉirkaŭ 60° sub nulo. En printempo kiam la arboj floras kaj herboj verdiĝas en la sudaj provincoj, tie ĉi neĝ-flokoj ankoraŭ flugas, kaj la teron kovras glacio. En somero la tago estas longa kaj la nokto mallonga—tagiĝas je la tria matene, kaj je la 9a vespere ankoraŭ ne mallumiĝas, sed en vintro la kazo estas tute inversa: tagiĝas je la 9a matene kaj noktiĝas je la 3a posttagmeze. Tie ĉi troviĝas montoj, riveroj, arbaroj, sed neniu homloĝanto. En la pasinteco la ngolenĉun'oj ĉasis ĉi tie, sed lastatempe pro malmultiĝo de sovaĝaj bestoj, ili forveturis.

En la vintro de 1952, ni—la 11-a teamo de termezuristoj de la Fervojo-ministerio, konsistanta el pli ol 400 kamaradoj, inter kiuj troviĝis han'oj, mongoloj, tibetanoj, manĉuoj kaj ngolenĉun'oj, komencis labori ĉi tie.

Kiam ni veturis per vagonaro al Jakeŝe-stacio kaj de tie ŝanĝis vagonaron al Kutul kaj de Kutul al la rivero Tuli, ni vidas survoje ĉe la ambaŭ flankoj densajn arbarojn. Domoj estis simple staploj da grandaj arbotrunkoj. Apud la vojo jam akumuliĝis 90,000 kubaj metroj da ligno por transporti al aliaj lokoj post la finkonstruo de la fervojo. Ĉe la suda flanko de Tuli-rivero estas granda herbejo, kie, post nelonge, aperos moderna urbo kun butikoj, fabrikoj, lernejoj kaj parkoj.

Transirinte Tuli-riveron, ni iris norden laŭlonge de Ituli-rivero, kaj alvenis al la interno de la primitiva arbaro. Aperis alia sceno. Ĉe la ambaŭ flankoj de la rivero kreskas ĝis-talie alta herbo, apud la herbejo estas

Ŝji Ĝang

En la Primitiva

densa arbarego, en kiu troviĝas ruĝaj arbustoj kun blankaj floroj, blankaj betuloj kun verdaj burĝonoj kaj larikoj. Kiam la sunradioj sin jetas tra la foliaro, ili montriĝas eksterordinare belaj. Arbaro kreskas sur la tuta monto. Ŝtono kaj tero ne estas videblaj, sed nur vidiĝas la grandioza maro de arbaro.

En tiu ĉi vasta altebenejo de la Granda Ĥingan-montaro, ni surgrimpis montojn, transiris grandajn riverojn, kaj persiste laboradis necedante al ĉiaj malfacilaĵoj. Ni devis projekti fervoj-liniojn en la loko kie ni preterpasis, por ebligi konstruadon de modernaj urboj kaj fabrikoj sur la herbejo, kaj por provizi al la granda landkonstruado per tiu ĉi neelĉerpebla ligno.

Ni transgimpis la eĝon de Ĥingan-montaro, kaj piediris pli ol 200 kilometrojn laŭ la Ora Rivero ĝis Balĉa-rivero termezurante. Por trovi linion, kiu estas pli mallonga, pli malkruta, pli malmultkosta en konstruado, kaj kiu, post finkonstruo, estos pli taŭga por transportado, ni devis esplori multajn liniojn por ilin kompari. Neniu homo troviĝis tie ĉi, de kie ni povis informiĝi pri la vojo, kaj ni mem devis elserĉi vojon. En la grimrado trans la montsupro, ofte niaj vatitaj pantalonoj disŝiriĝis. Kiam ni trovis pli malkrutan montdeklivon, ni tuj raportis kvazaŭ ni akiris trezoron. La piedirantaj termezuristoj similas al avangardo de armeo. Kie ajn ni alvenis, ni starigis tendojn. Tutempe ni troviĝis en arbarego, kie la suno kaj la ĉielo tute kaŝiĝis, kaj ni ne povis sin orienti. Kelktempe en nokto ni devis tre zorgeme singardi kontraŭ la atako de ursoj, lupoj aŭ aproj.

Post kiam iu linio estis fundamente projektita, la kamaradoj de la linio-elekta grupo starigis ruĝblankajn flagojn en la arbaro, kaj tiuj de la linio-konduka grupo starigis palisojn laŭ la linio. Je la plej granda rapideco, ili povis fini pli ol kvin kilometrojn potage.

Tra Nordokcidenta Ĉinio

(daŭrigo de p. 199)

administra regiono ĝi tamen havas nur 6 procentojn de la tuta loĝantaro de la lando. Ĉirkaŭ 6,200,000, preskaŭ kvinono de la tuta loĝantaro en la Nordokcidento, estas anoj de la 16 naci-minoritatoj tie loĝantaj—ujvuroj, huĵoj, tibetanoj, mongoloj, kazakoj kaj aliaj. Dum centjaroj sanga interbatalado ekzistis inter la diversaj minoritatoj. Terura memorigaĵo de tia tempo estas la Bajgu-turoj (Turoj de Blankaj Ostoj), kie la ostoj de la mortigitaj estas tenataj. Sur multaj montdeklivoj, mi trovis multe da kot-fortikaĵoj, restaĵoj de defendadoj konstruitaj de unu nacio kontraŭ la atakoj de alia.

Ĉi tiuj antikvaj kvereloj estas nun pasinta historio. La Popola Registaro aplikis multe da rimedoj por plifortigi la unuecon de la diversaj nacioj. Ĝi plenumas paŝo-post-paŝe politikon de regiona aŭtonomio, religia libereco, respekto al naciaj kutimoj kaj tradicioj, kaj helpado en disvolvado de ekonomia, kultura kaj eduka laboro en la naci-minoritataj regionoj.

Post vizito al la Nordokcidenta Instituto por Nacioj en Lanĉoŭ, en kiu lernas 1,500 studentoj el 16 nacioj kiuj estas trejnataj por labori en la ekonomia kaj

kultura konstruado de siaj respektivaj regionoj, mi foriris al Labrang.

Vizito al Labrang

Forlasinte Lanĉoŭ kaj veturante al la sudo, la aŭtobuso antaŭenkuris laŭlonge de la bordoj de la klara Daŝja-rivero kiu estas borderita ambaŭborde de krutaj kaj altaj montoj kovrataj de pinoj. La aero estas plena de freŝa aromo el la pinoj kaj multaj floroj ĉi tie kreskantaj. Oraj tegmentoj de temploj brilis inter la foliaro kaj videblis de malproksime. Iu hejmensopiranta tibetano sidanta apud mi en la aŭtobuso subite eksplodis per bela himno kiu ege tuŝis ĉiujn pasaĝerojn. Kaj ĉe la finiĝo de la kanto ni jam troviĝis en Labrang.

Labrang estas fama monaĥejo kaj komerca centro. Pli ol 3,000 lamaoj kaj 500 Vivantaj Budaoj vivas en ĝiaj temploj.

Ĉi tiuj konstruaĵoj estas grandiozaj kaj ĉirkaŭataj per pli ol mejlo da verandoj laŭlonge de kiuj metiĝas centoj da preĝ-radoj. Ruloj da Budaj sanktaj skriboj sin trovas en ĉi tiuj radoj kiuj similas al malgrandaj tamburoj.

Templo-foiroj okazas naŭ fojojn ĉiujare kaj ilin ĉeestas popolanoj el tiel malproksimaj lokoj kiel Tibeto. Tendoj de multaj koloroj por dancado, kantado kaj

Arbaro de la Granda Ĥingan-montaro

Termezurante en la arbaro, oni devis dehaki multajn grandajn kaj malgrandajn arbojn, por fari rektan vojeton kaj faciligi la laboron. Kelktempe ni renkontis tiel densan arbaron, ke ni devis dehakadi la arbojn dum kelkaj tagoj por fari vojon en ĝi. Ĉi tie, pro la malvarmeo, la tero estas tutjare frostigita, kaj la arboj radikigas ne profunde en la tero, multaj grandaj arboj ofte estis elradikigitaj de ventego, kaj putriĝis. La kvanto de ligno tiel putriĝinta dum unu jaro jam sufiĉas por konstruo de fervojo de Manĝoŭli ĝis Kantono. Nun la falintaj arboj ankoraŭ kuŝas sur la vojo devigante la vojirantojn transgrimpi aŭ subrampi ilin. Iu ŝercema kamarado rimarkis: "Tiu ĉi falintaj arboj baldaŭ leviĝos kaj estos transportitaj al ĉiu parto de la lando por fari ĝi kolonoj de grandaj domoj!" Sur la vojeto tiel dike amasiĝis neĝo, ke ĝi altis ĝis la genuoj. Sur la tero krom la blanka neĝo estis flavaj pinfolioj kaj ruĝaj pinŝeloj. La postirantoj devis sekvi la piedsignojn de la antaŭirantoj. La vetero ŝanĝiĝis kelkfoje ĉiutage. Jen nigra nubo leviĝis, kaj neĝoflokoj ekflugis amase, kaj jen, duon-horon poste, la neĝado ĉesis, la blua ĉielo vidiĝis kaj la sunbrilo sin ĵetis sur la neĝo, blindigante la okulojn. Ĉiutage ni ĝoje laboradis en la arbomaro de Ĥingan-montaro kun manoj skuante la ruĝblankajn flagojn kaj okuloj rigardantaj tra mezuraj instrumentoj, malgraŭ la malvarmo, la vento kaj la neĝo.

Estas tre malfacile proviziĝi ĝustatempe per necesajoj en tiu ĉi senhoma kaj malfacile komunikebla regiono. Krom la brulligno kaj drinkaĵo el neĝoakvo, kiuj estas ĉi tie akireblaj, la aliaj diversaj materialoj devis esti transportataj ĉi tien de malproksimaj lokoj kelkcent kilometrojn for. 45 kilometrojn norde de Genrivero, estas iu "memserva" provizo-stacio. Materialoj estis alportitaj tien ĉi el la "postfronto", kaj la homoj

komercado distaras sur la montetoj kaj kampoj. La tibetanoj venas por vendi lanon, felon kaj moskon kaj aĉeti grenojn, teksaĵojn kaj teon. Ili avidas aĉeti delikatajn porcelanajn varojn el Ĝingdeĝen de Kiangsi-provinco kaj broditajn brokatojn el Nankino, agatajn kaj sukceajn juvelojn.

Dum la tagoj sub la reakcia Kuomintang-regado la friponaj komercistoj trompis la popolanojn senkompate. Kiam tiaj friponaĵoj kiaj trompa peso kaj falsaj artikloj estis malkovritaj, perforto ofte okazis. La Kuomintangaj militaristoj en intima ligado kun la spekulaciistoj protektis ilin per siaj fortoj, lokante maŝin-pafilojn ĉirkaŭ la foiro kvazaŭ ĝi estus batalkampo.

Hodiaŭ en la foiroj regas bona ordo. Kontraŭleĝaĵoj de ĉiuj specoj estas severe malpermesataj. Por la bono de la popolo, la Landa Brutoprodukta Korporacio de Ĉinio ĉiujare plialtigas la prezojn de la lokaj produktaĵoj, dum la ŝtataj komercaj kompanioj konstante malaltigas la prezojn de ĉiutagaj necesajoj.

Mi foriris de la Nordokcidento kun viveca memoro pri la aktiveco de la naci-minoritatoj, la fervoj-laboristoj kaj la geologoj... Vekiĝis la maljuna Nordokcidento. La popolo estas kuracanta la profundajn vundojn de la pasinteco. Ili laboras energie por la paca konstruado de la regiono.

sur la "fronto" venis tien por mem preni siajn necesajojn.

Ni vivas ne malbone dank' al la kamaradoj, kiuj konkeris multajn malfacilaĵojn, transportante provizaĵojn. Ni havas komfortajn peltajn surtuton kaj ĉapelon, kaj por manĝi ni havas rizon aŭ farunon, porkaĵon, ŝafaĵon, kokaĵon, salitajn fiŝojn kaj spicitajn legomkonfitaĵojn. Sed, por la tabako-amikoj estas maloportunaĵo "fumi malpermesite" ĉi tie, por antaŭgardi fajropregon de la arbaro. Kelktempe kiam ventego blovis, ni ne povis kuir kaj ni manĝis nur malvarman rizaĵon antaŭe kuiritan.

Ĉiutage post la 6a p.t.m. estas la tempo kiam ni ĉiuj plej vigliĝas. Ni revenas al niaj tendoj el diversaj laborpostenoj, kaj ni manĝas tion, kion niaj kuiristokamaradoj preparis por ni kaj trinkas bolintan akvon el neĝo kaj glacio. Post vespermangio ni sin amuzas—kelkaj el ni ludas pilkon, aliaj ludas ŝakon aŭ kartojn, aliaj legas nian murgazeton... la radioaparato disaŭdigas laŭtan muzikon. Estas vere mirinda belajo, kiam la subiranta suno oblikve ĵetas siajn radiojn tra la foliaroj. Kiam noktiĝas, ni ekzamenas en niaj tendoj nian laboron dum la tago, kaj faras preparojn por la morgaŭa nova lukto! Kelktempe, kiam ĉiuj aliaj endormiĝis, la teknikistoj daŭre laboradas sub la gas-lampo ĝis profunda nokto, meze de la ululo de lupoj kaj heno de ĉevaloj, desegnante mapojn laŭ la registroj kiujn ili mezuris dumtage.



Post la konstruado de la fervojo la arboj transportiĝas al diversaj konstruejoj de Ĉinio.

AMIKECO

U Ŝaŭ-ĉi kaj Gu Lej

La loĝantoj de Anŝan, la ŝtal-urbo en Nordorienta Ĉinio, emas konsideri sian urbon "La kristalo de amikeco inter Ĉinio kaj Sovetunio." Tio ne estas kaprico sed io bazita sur fakto. Multaj el la fabrikoj de Anŝan estas konstruitaj per la helpo de Sovetia popolo kies teknikistoj partoprenis en la projekt-laboro de tiuj fabrikoj kaj instruis ĉinajn laboristojn kiel manipuli Sovetiajn aŭtomatajn maŝinojn.


En la konstruado de la unua fabriko en Ĉinio produktanta senjuntajn tubojn ni trovas la floron de tiu mirinda amikeco. Sovetia helpo faris tiun grandan fabrikon unu el la plej modernaj en la mondo. Kiam la fabriko proksimume finkonstruiĝis, grupo de 40 laboristoj kaj teknikistoj venis pretaj por komenci laboron. Ili ĵus revenis de iu ŝtal-centro en Uraloj kie ili laboris kaj studis kune kun parto de la plej bonaj Sovetiaj laboristoj por ok monatoj.

Nun tiuj ĉi junaj, energi-plenaj konstruantoj de Ĉinio sin trovas denove en sia patrolando portante kun si la plej progresan teknikon de sia fako. Iliaj notlibroj estas plenigitaj per informoj skribitaj en rusa lingvo. kiujn ili lernis post diligenta studado. Ĉiu el ili mastris specialan scion praktikan kaj teorian.

Plej Bona Lernejo, Plej Bonaj Instruistoj

Tiu ĉi eksperimenta grupo iris al Sovetunio en lasta aŭtuno. Sovetunio sendis ilin al sia plej granda kaj bona fabriko de senjuntaj tuboj en Uraloj. Tiuj ĉi ĉinaj lernantoj estis metitaj en la plej bonaj laborejoj kaj en la plej bonaj labor-grupetoj. Ĉiu havis instruiston elektitan el la plej bonaj stahanoj laboristoj aŭ spertaj metalurgiistoj de la fabriko, multaj el kiuj

Laboristo studinta en Sovetio instruas al laboristinoj teknikon pri produkto de senjuntaj ŝtal-tuboj.



iam akiris altajn ŝtatajn premiojn. La tuta fabriko rigardis la instruadon de tiuj studentoj kiel grandan taskon.

La fabriko sciigis la instruistojn, "Ĉiu fakto kaj cifero kiujn vi donas al la ĉinaj kamaradoj estu 100 procentojn akurataj." La instruistoj diris: "Estas granda honoro instrui la ĉinajn kamaradojn ĉar la prospero de Ĉinio signifas pligrandigon de la pacaj fortoj."

Inĝeniero Gagov, ĉefo de la revarmiga fornego, kiu trifoje ricevis medalojn pro sia bonega laboro, diris al siaj lernantoj: "Mi volas sciigi al vi ĉion kion mi lernis de mia dudek-jara sperto." La vortoj de Gagov reprezentis la ĝeneralan sentimenton inter la instruantoj.

En la unua tago Gagov donis detalan klarigon pri ĉiu parto de la fornego. Post kiam li finis, li turnis sin al siaj junaj lernantoj kaj diris, "Nun vi provu, komencu de la unua procedo." Kaj kiam la lernantoj transprenis la direktilojn, li staris post ili kaptante foje kaj refoje iliajn manojn por helpi ilin. Evidente, instrui ilin estis plezuro por li.

Ĉiutage li superŝutis la trejnatojn per demandoj pri la funkciigo de la fornego, certigante ke ili komprenis ĉion kion li instruis al ili. En ĉiu libera momento li kutimis paroli kun ili pri la malfaciloj kiujn li renkontis en sia laboro kaj tio kion li lernis konkerante ilin.

Ĉiu el la grupo havis similajn rakontojn.

Instruado senegoisma

En tiu fabriko oni kalkulis la laborkvanton laŭ horo. La laboristoj rigardis la plenumadon de sia produkt-plano kiel plej gravan aferon. Sed la tuta fabriko helpis la ĉinajn trejnatojn akiri teknikan scion eĉ je la kosto de produktado. Kiam la ĉinaj laboristoj komencis praktiki, ili estis tro nervozaj aŭ ne lertaj kaj akcidentoj kelkfoje okazis. Ili difektis ekipaĵojn, ilojn kaj malbonigis produktaĵojn. Sed la instruistoj neniam montris la plej malgrandan malkontentecon aŭ malpaciencon.

Kiam k-do Malesijev, kiu instruis la manipulon de diametro-fiksa aparato, klarigis kiel eviti akcidenton en la manipulado. Pro la kompleksa enhavo, la lernantoj ankoraŭ skuis sian kapon post kelkfoja klarigo. Intence li malkorrekte aranĝis la maŝinon, ke du fuŝfaritaj tuboj estis produktitaj. Jen li denove klarigis detale la aferon montrante la fuŝfaritajn tubojn. Kvankam tio malaltigis lian personan produktan kvanton, tamen kiam li trovis ke la lernantoj perfekte komprenas la kaŭzon de la fuŝo kaj plie ili povas bone rearanĝi la maŝinon por tion eviti, li sentis grandan ĝojon.

Unu el la lernantoj de Gagov superhejtis la fornego. Tio difektis la 20 ŝtal-ingotojn. Gagov diris, "Ne maltrankviliĝu. Tio estas valora sperto ĉar nur tiaj

(daŭrigo sur p. 207)

Ĉinaj Altaj Lernejoj


Preparas Laborantojn
por la Grandskala
Ekonomia Konstruado




Supre: Studentoj de la Elektro-
inĝeniera Departamento de la
Sudĉinia Inĝeniera Kolegio
faras eksperimentojn pri mag-
netismo en la laboratorio.

Maldekstre: En la eksperiment-
fabriko de la Sudĉinia In-
ĝeniera Kolegio.

Sube: Studentoj de la Unua
Elektro-industria Lernejo de
Ĉangĉun lernas instalati altten-
siajn dratojn.




En la laboratorio de la Unua Elektro-industria Lernejo de Ĉangĉun





Budao kaj Bodisativo el Norda Ŭej-dinastio.
(Niĉo N-ro 79)





Starantaj Budaoj el Tang-dinastio.
(Niĉo N-ro 51)



Supre
Kapo d
Ŭej-din
verao

Sube
Skulptit
el T
(Kaver





Panoramo de la kavernoj

ARTTREZOROJ DE BINGLING-TEMPLO

maldekstre:
de Budao el
stio: (Ka-
N-ro 81)

maldekstre:
a sanktujo
ang-dinastio.
no N-ro 3)

Tiujn ĉi fotojn faris la ekspedicio kiu iris studi la rokajn kapelojn de Bingling-templo, lasttempe malkovrita en la Malgranda Ĝiŝi-monto en Kansu-provinco, Nordokcidenta Ĉinio. Tiuj ĉi kapeloj kaj la artaj majstraĵoj kiujn ili entenas estas altvaloraj laŭ arta kaj historia vidpunktoj.

Figuro de jakŝo (Ĉiela Gardanto) el
Tang-dinastio. (Niĉo N-ro 56)



Parto de repentrita fresko de Sung-dinastio,
kopiita de Ĝang Ding. (Kaverno N-ro 84)






hospitalo por Militkaptitoj en Norda Koreio

Ĉi tiu ĉi 120-lita hospitalo estas bone ekipita per modernaj instalaĵoj kaj instrumentoj kaj provizita per gravaj kuraciloj kiel *ureomycin*, *chloromycetin* ktp. Militkaptitoj jam donis siajn pruvojn pri la bona traktado kiun ili ricevis ĉi tie.

be, desupre:

ugh R. Rapier, RA 15275060. Usono, ricevas operacion al sia vundita okulo.

William George Reynolds, 5437156, Britio, kuracata de dentisto.



Supre, desupre:

Yasak Mehmet, 18231, Turkio, ricevas X-radian ekzamenon pri sia mano.

Preparo por inokulado.

Militkaptitoj rivevas la plej bonajn medikamentojn haveblajn en la bone ekipita apoteko de la hospitalo.

eraroj instruas la komencantojn kiel eviti ilin en estonteco." Tamen la sekvintan tagon membro de la kontrolo sekcio venis kaj sciigis al Gagov ke lia unuo produktis fuŝojn en la antaŭa tago. Gagov konfesis la eraron sed tute ne menciis la kaŭzon.

La ĉinaj lernantoj povis dece nomi siajn Sovetiajn amikojn la plej bonaj instruistoj en la mondo. La Sovetiaj teknikistoj ne nur estis paciencaj dum laborhoroj, sed ili fordonis sian libertempon al la instruado al la lernantoj. Unu ekzemplo estis Petrov, elektisto kiu deĵoris nokte. Li persistis doni lekciojn al siaj lernantoj ĉiutage kiam lia deĵoro finiĝis—kaj kiom da pluaĵ horoj li bezonis por prepari ilin!

Amataj Gastoj

En Uraloj oni tiel aranĝis ke la ĉinaj lernantoj sentis sin kvazaŭ hejme. En la unua tago kiam ili estis veturigataj al la fabriko, ili estis ĉirkaŭataj de homoj kiuj diris al ili, "Ni jam vin atendis longan tempon."

Mez-lernejaj studentoj invitis ilin al vesper-kunvenoj kie la ĝejnuloj deklamis ĉinajn poemojn, kantis ĉinajn kantojn kaj instruis al ili dancon. Dum la vesperoj multe da homoj vizitis ilin. "Ĉu vi estas komfortaj ĉi tie?" "Ĉu vi jam kutimiĝis al la vivo ĉi tie?" "Ĉu vi ricevis leteron el hejmo?" Kaj ili faris ĉinajn amikecajn demandojn. Ĉe kinejo, la viciĝintaj biletaĉetantoj ofte puŝas la ĉinajn amikojn al la kapo de la vico por ke ili pli frue havu la bileton se ili estis trovitaj de la amaso.

Okaze de la 35a datreveno de la Oktobra Revolucio lastjare, oni donis al la ĉinaj lernantoj la honoron marŝi en la plej antaŭaj vicoj de la kontingento de tiu fabriko dum la loka parado.

Tuj post kiam la demonstracio finiĝis, maljuna laboristo Oŝipov invitis kvar lernantojn al sia hejmo. Survoje ili estis subite haltigitaj de alia Sovetia ka-

marado: "Troviĝas kvar ĉinaj amikoj. Sufiĉas ke du el ili iru al via hejmo, kaj la aliaj du iru al la mia!" Sed diris Oŝipov: "Ili estis invititaj de mi, do ili iru al mia hejmo. Bonvolu ilin inviti la venontan fojon!" Tre longe ili disputis. Fine la nekonata amiko cedis kaj surmetinte palton li kuniris al la hejmo de k-do Oŝipov. Kaj li diris kun bedaŭro al la ĉinaj amikoj: "La venontan fojon vi nepre venu al mia hejmo!"

Tamen k-do Oŝipov jam monopolis la kvar ĉinajn amikojn, ĉar ili laboris kun li en sama grupeto. Ili estis invititaj al lia hejmo ĉirkaŭ du fojojn ĉiusemajne. La maljunulo koleris se ili ne iris. Li eĉ diris: "Mia edzino koleris ankaŭ!" Ĉiŝfoje li regalas la gastojn per bonegaj vespermanĝoj. Li ofte propramane distribuis manĝaĵojn al la teleroj de la gastoj tiel ke la kvar teleroj estis ofte plenplenaj, kaj samtempe li diris: "Mi ree koleris se vi ne manĝus!" Li lasis sin foti kune kun la ĉinaj amikoj. Sur la bildo li skribis: "Neniam forgesu min!"

La ok monatoj rapide pasis. La eksperimenta grupo finis sian kurson kaj sin pretigis por iri hejmen. La instruistoj diris al ili: "Kamaradoj, se vi renkontos problemon kiam via fabriko komencos produktadon, bonvolu skribi al ni." Unu el ili diris al siaj lernantoj: "Skribu al mi ĉiun monaton kaj ne forgesu enmeti kovrilon skribitan en ĉina lingvo tiel ke mi povu respondi al vi. Se ni eltrovas novajn metodojn ĉi tie aŭ faras novajn rekordojn, mi informos vin pri tio."

La ĉinaj laboristoj estas hejme nun. Ili estas pretaj por komenci produktadon en la nova fabriko dum la bondeziroj de la Sovetiaj instruistoj ankoraŭ resonas en iliaj oreloj.

KOREKTO

Aŭgusta numero, p. 184, kol. II, linio 3.
legu: *La fama diro de Lenin: "Sovet-reĝimo + elektrizo = komunismo"*

KURANTAJ AFEROJ

Novaj Pac-poŝtmarkoj Eldonitaj

Tria serio de memorigaj poŝtmarkoj pri defendo de mondopaco eldoniĝis la 25an de julio de la Ministerio de Poŝto kaj Tele-komunikado de Ĉinio por memori la Kongreson de la Popoloj por Paco kiu okazis en Vieno je la 12a de decembro, 1952.

Sur la poŝtmarkoj estas reproduktita la paca kolombo pentrita de Picasso por la Kongreso de la Popoloj por Paco. La rektangulaj horizontalaj poŝtmarkoj konsistas el tri kategorioj: 800-juanaj en violkoloro, 400-juanaj en brunkoloro, kaj 250-juanaj en verdokoloro.

Pli frue, du serioj de mondopacdefendaj memorigaj poŝtmarkoj eldoniĝis respektive je la 1-a de aŭgusto, 1950, kaj la 8a de aŭgusto, 1951.

Unuaj X-radiaj kaj Aliaj Kuracaj Aparatoj Prokuktiĝis

X-radiaj kaj elektro-terapiaj maŝinoj la unuan fojon estas fabrikataj en Ĉinio de iu fabriko de precizaj kurac-ekipaĵoj en Ŝanhajo. La eksperimenta fabrikado komenciĝis je la fino de 1951.

140 elektro-terapiaj maŝinoj, kiuj estas necesaj ekipaĵoj por kuraci reŭmatismon, estas produktitaj en la unuaj ses monatoj de ĉi tiu jaro. Iliaj kostoj estas duono de la importitaj. La kosto de x-radiaj aparatoj estas ankaŭ multe pli malalta ol tiuj faritaj eksterlande.

La fabriko estas ankaŭ produktanta trans-violajn lampojn por ministoj kaj specialan kuracan aparaton por registri la homajn pulsobatojn. Grandaj monsumoj estos investitaj de la Ministerio de Malpeza Industrio por pligrandigi la nunan fabrikon kaj kapabligi ĝin plenumi la bezonon de la lando.

3,000 Transmaraj Ĉinaj Studentoj en Sian Patrolandon

Pli ol 3,000 transmaraj ĉinaj studentoj lastatempe alvenis el Indonezio, Malajo kaj Borneo por studi en Ĉinio.

La Popola Registaro jam asignis personaron por prizorgi iliajn bezonojn tuj kiam ili eniris la sojlon de Ĉinio. Senpaga manĝado, loĝado, kaj ankaŭ vojaĝelspezoj kaj subvencioj estas provizitaj al tiuj kiuj bezonas tiajn helpojn.

KURANTAJ AFEROJ

Antaŭ Ĉio Lasu Min Vidi Prezidanton Maŭ

I Sin

Liberigo, kiel printempa sunradio, alportis lumon kaj varmon al la laborantaj popolamasoj, kiuj longtempe ĝemadis sub reakcia regado. Tion profunde sentis precipe maljuna Onjo Ĉen, kiu estas armeana familiano loĝanta en n-ro 7, Caŭĝja-placo, Tria Distrikto, Tienzino.

Ĉijare, Onjo Ĉen havas jam 64 jarojn, kaj Oĉjo Ĉen estas 70-jara. Tiu ĉi maljuna geedza paro loĝas ĉe sia nevo Ĉen Te-fu.

En la printempo de 1945, kiam la okuloj de Onjo Ĉen ankoraŭ ne blindiĝis, ili loĝis en Lingĝja-strateto. Tiam, sub la regado de la japana invadantaro, oni mizere vivis per miksitaj faruno.* Maljuna Oĉjo Ĉen kolportis migdal-trinkaĵojn, kaj dum tuta tago perlaboris apenaŭ kelkajn monerojn. Ili povis vivteni sin dank' al tio ke Onjo Ĉen faris kudristinan laboron. Ilia filino jam antaŭ longe edziniĝis, kaj 17-jara filo, kiu laboris en japana fabriko, ŝtele foriris al la Nordoriento pro la netolerebla krueleco de japanaj diabloj. Ĝuste en la fino de tiu ĉi jaro, Oĉjo Ĉen malsaniĝis sub la ŝarĝo de pezaj ŝuldoj. Turmentite de ĉagreno kaj ankaŭ de la sopiro al la filo, Onjo Ĉen ekhavis malsanon je la okuloj. Ŝia vido malklariĝis. Post nelonge la dekstra okulo jam nenion povis vidi. Kaj post kelkaj jaroj, la maldekstra okulo ankaŭ blindiĝis.

* Miksitaj faruno estas farita el diversspescaj maldelikataj grenoj kaj herbsemoj.

Perdinte sian vidkapablon, maljuna Onjo Ĉen devis esti ĉiam zorgata de aliulo. Tial ŝi transloĝiĝis en la hejmon de sia nevo, kiu havis sep infanojn kaj loĝis nur en unu malgranda ĉambro. Tien transloĝiĝis ankaŭ maljuna Oĉjo Ĉen. Dumtage li elmetis ekstere vendstandon de sukeraĵoj, kaj nokte li dormis en la senfenestra ĉevalstalo.

Ĉiutage Onjo Ĉen restis sur la briklito de la bonevino. Kiam ŝi estis nedormanta, ĉu tage, ĉu nokte, la du senlumaj okuloj ĉiam gape rigardis antaŭen. Dum somero, kiam estis sufoke varme en la domo, tiam ŝi palpante iris ekster la stratpordon por sin refreŝigi. Tiam ŝi plej ofte estis kondukata de sia kvarjara nepino Fuer.

Ofte, ŝi subite malpacientiĝis, batadis al si la bruston per la manoj, kaj per la kapo rekte frapis la muron. Tio ofte teruris Fuer ĝis plorkrio.

Onjo Ĉen malŝatis pluvon. Kiam pluvis, ŝi ofte diris senpacience "Ve, estus pli bone morti pli frue!"

Se Fuer estis apude, ŝi nepre diris: "Avinjo, paciencu....Se vi mortos, mi vin sekvos!"

"Infano, por kio vi min sekvos?"

"Nu, por tiri bastonon por avinjo!"

Maljuna Onjo Ĉen eligis ĝemspiron, kaj brakumis ŝin al sia sino, kaj larmoj falis guton post guto sur la kapon de la infano.

KURANTAJ AFEROJ

Esplorado por Nova Fervojo en Sudokcidenta Ĉinio

Esplorado por alia nova fervojo en la montoza Sudokcidenta Ĉinio, la Ĉengtu-Kunming-a Fervojo, estas jam komencita. La taksita longeco de la nova linio estos 810 kilometroj.

La nova fervojo komenciĝos mezvoje de la nove konstruita Ĉengtu-Ĉungkinga Fervojo en Setuan-provinco, serpentumos laŭ la supra parto de Jangze-rivero, Ĝinŝa-rivero, kaj finiĝos ĉe Kunming, la ĉefurbo de Junnan-provinco. Pli ol 1,000 homoj en tri esplorgrupoj estas laborantaj super la projektita linio.

Unua Dokumenta Kolor-filmo Eliris

La unua dokumenta kolor-filmo de Ĉinio, pri la "Aŭgusto-unua" Armea Sportokunveno kiu okazis en Pekino lastjare, jam prezentiĝis en ĉiuj grandaj kinejoj en Pekino ekde la 31a de julio, por celebri ĉijaran Armean Tagon je la 1-a de aŭgusto, —la 26-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

Tiu ĉi unu-kaj-duon-hora dokumentaĵo estas kuna produktaĵo de la Pekina Filmfabriko kaj la P.L.A. Filmfabriko. Ĝi enhavas ĉiujn scenojn de la multspecaj interesaj agadoj en tiu ĉi landskala sportokunveno: la miriga flugarto, la paraŝuto-saltoj, la kuraĝaj ĉevalo-

rajdoj kaj kur-konkursoj, la ekscitaj diversaj pilkludoj kaj multaj aliaj amuzaj prezentaĵoj.

Japanio Dankas pro Helpo al Superakvego-viktimoj

La Popola Sav-Administracio de Ĉinio ricevis mesaĝojn de la Nacia Sav-Asocio de Japanio kaj la japana populara eminentulo, Ikuro Oama, adresantaj dankemon al la ĉina popolo pro ilia helpo al la superakvego-viktimoj en Kjuŝu.

La 20-an de julio, la Sav-Administracio sendis monsumon de 1,236, 470,000 juan-oj (ĉ. 18 milionoj da japanaj jen-oj), pere de la Nacia Sav-Asocio de Japanio, por helpi la superakvego-viktimojn de Kjuŝu. Peto por helpo venis per letero subskribita de Tacuji Fuse, Prezidanto de la Nacia Sav-Asocio de Japanio. La letero estis adresita al Sung Ĉing-ling, Prezidanto de la Popola Sav-Administracio de Ĉinio.

Ekinformiĝinte pri la akvokatastrofo en la posta parto de junio, la Popola Sav-Administracio de Ĉinio senprokraste komencis kolekti helponon kaj sendis telegramon al Tacuji Fuse, Prezidanto de la Nacia Sav-Asocio de Japanio, esprimanta profundan maltrankvilecon de la ĉina popolo pro la japanaj superakvego-viktimoj.

KURANTAJ AFEROJ

Ankaŭ Oĉjo Ĉen ofte ŝin konsolis, admonis ŝin esti pacienca. Tamen, kion tio utilis?

Liberigo venis, mondoskua ŝanĝo okazis ekstere. Ŝi aŭdis klaran krakadon de krakfajraĵoj kaj laŭtajn bruojn de tamburoj kaj tantamoj; ŝi aŭdis ridadon de najbaroj anstataŭ kvereladon, ĉar anstataŭ kvereli surstrate, oni parolas inter si pri la pli kaj pli feliĉa vivo.... Ĉio ĉi tio konsciigis ŝin, ke la mondo ekstera fariĝas tute alia ol en la pasinteco. Ŝi eksciis ke tiu ĉi ŝanĝo havas rilaton kun la nomo de iu, kiu estas tre ofte menciata de la popolamasoj. Tiu estas Prezidanto Maŭ.

Ŝi tre ŝatas aŭdi la infanojn revenintajn el lernejo kanti en la korto:

“Oriente ruĝas sun’. Ĉe ni estas Maŭ Ze-tung...”

Atente ŝi aŭskultis. Kiam la infanoj finis la kanton,



Post la kuraciĝo Onjo Ĉen jam povas kudri.

ŝi nepre diris: “Ankoraŭ fojone! Ankoraŭ fojone!” Tiam la kantvoĉo de la infanoj denove ekvibris en la malgranda korto.

La plej ĝojinda afero por ŝi estas tio, ke la filo jam en 1945 en Ĝjamusi aliĝis al la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kaj fariĝis glora batalanto. Ŝi mem kaj Oĉjo Ĉen do fariĝis gloraj armeaj familianoj. La Bonevino akiris laboron en kanabsako-fabrike, kiu estas establita por armeaj familianoj. Pro la rekomendo de la registaro, la plejaĝa nepo estas dungita en Ĝenhŭa-maŝinfabrike, kaj jam prenis al si edzinon. La domposedanto memvole pruntedonis al Oĉjo Ĉen malgrandan flank-ĉambro neokupatan. Por faciligi ilian vivon, la distrikta registaro, krom donaci al ili manĝprovizajojn por armeaj familianoj dum novjaroj kaj festoj, ankaŭ havigis al Oĉjo Ĉen la okupon prizorgi la publikan akvoprovizejon, ne malproksime de lia loĝejo, kaj ĉiumonate li ricevas salajron. Por ili vivo fariĝas pli bona kaj komforta ol antaŭe. Karesante la vangojn de la infanoj, Onjo Ĉen trovis, ke ili grasiĝis.

En la jaro 1951, kiam la nacia festo proksimiĝis, la strata grupestro de armeaj familianoj vizitis familion Ĉen. Tiam Onjo Ĉen estis staranta en la korto. Rigardante la sunon kun levita kapo, ŝi diris: “Miaj okuloj definitive difektiĝis, la suno por mi estas nur ruĝa ombro!”

Tiu ĉi parolo vekis la atenton de la grupestro. Li pensis: “Ŝi vidas ruĝan ombro, do la okuloj estas ankoraŭ vidkapablaj, kaj ili eble reboniĝus, se oni donos al ŝi konvenan kuracon.” Li tuj sciigis la aferon al la socia fako de la distrikta registaro. Tuj en la sekvinta tago, iu laboranto de la registaro persone venis al familio Ĉen por viziti ŝin.

En la tria tago post la nacia festo, laŭ la fiksita arango doni senpagan kuracadon al malriĉaj malsanuloj, precipe specialan favoron al armeaj familianoj, la distrikta registaro skribis por Onjo Ĉen rekomendan leteron, por ke ŝi iru al la Unua Hospitalo, kiu senpage kuracas. Tie la okulisto plenumis por ŝi detalan ekzamenon, kaj trovis ke sur la pupiloj estas albugo, kaj decidis fari operacion. Kiam la kuracisto estis faranta al ŝi la operacion, ŝi sentis ke lumo ekbrilas antaŭ la okuloj. Kia feliĉa lumo! Ŝi preskaŭ ekris pro ĝojo. Sed la kuracisto tuj bandaĝis ŝiajn okulojn por doni al ili plenan ripozon.

En iu tagmezo post du semajnoj, sur la vojo al hejmo, Onjo Ĉen ankoraŭ remaĉis la ĵusan ĝojon, kiam ŝia bandaĝo estis forprenita en la hospitalo kaj ŝi ekvidis la ankoraŭ ne viditan bonepinon, kiu jam servis al ŝi dum pli ol unu jaro. Kiam ŝi atingis la hejmon, en la korto regis pli da entuziasma bruo ol dum la novjara festo: la nevo, bonevino, nepoj kaj nepinoj kaj la najbaroj de la sama korto, ĉiuj alkuris al la pordego, konkure kondukis ŝin en la domon kaj sidigis ŝin sur la brikliton.

La nepoj kaj nepinoj ĵetis sin al la avino. La dua nepino diris: “La okuloj de avinjo resaniĝis!” kaj la unua nepino diris: “Avinjo, vidu, kian belan veston mi havas!” La onjoj de la sama korto demandis konkure: “Kiel oni vin kuracis?” “Ĉu vi sentis doloron, kiam oni vin operaciis?” Samtempe ili interparolis: “Estas neniam aŭdite, ke blindulo povas reakiri sian vidon!” “Sen Prezidanto Maŭ, ĉu la okuloj de avinjo povus reboniĝi!”

La tuta ĉambro estis plena de ridado. La bonodoro de kuirata fiŝo kaj vaporumata pano de tempo al tempo elfluis el la kaldronoj.

Onjo Ĉen ĵetis rigardon jen al la briklito, kiu servis ŝin jam kelkajn jarojn, jen al la multe kreskintaj genepoj jam por ŝi ne rekoneblaj, jen al la maljuna edzo, kiu jam ne povis elparoli pro ĝojego, kaj jen al la najbaroj, kiuj venis por rigardi ŝin. En ŝia koro subite ondiĝis ia ne esprimebla emocio, ŝi rigardis tien kaj ĉi tien. Se ne estus tiel multe da homoj en la ĉambro, ŝi certe ĵetus sin al la sino de la maljuna edzo kaj plorus ĝis kontento. Sed ŝi nenion diris. La deziro, kiu jam delonge sin kaŝis en la koro, ŝin starigis. Ŝi forŝovis la homojn ambaŭ flanken, dirante: “Antaŭ ĉio lasu min vidi Prezidanton Maŭ! Mi ja volas scii kiel li aspektas.”

Levante la kapon ŝi serĉis la portreton de Prezidanto Maŭ. Iu diris al ŝi, ke ĝi troviĝas ĝuste sur la muro.

Kun brilantaj okuloj Onjo Ĉen fiksas la rigardon al la portreto de Prezidanto Maŭ, kaj ekridis. Estis rido plena de feliĉo kaj dankemo! Kaj ĉiuj homoj en la ĉambro ridis kune kun ŝi.

Gravaj Libretoj

Rakonto pri la Bildrakontaj Libroj de Nova Ĉinio

Li Ĉjun

La bildrakontaj libretoj de nova Ĉinio estas speco de malpeza kavalerio literatura. Ili trabalaas la fronton de malnovaj ideoj kaj neprogreseco. Ili lasas siajn atingojn de scio kaj belo esti firmigitaj poste de pli esencaj literaturaj fortoj. Estas ordinare vidi en Ĉinio miksitajn grupon da infanoj kaj plenaĝuloj svarmiĝantaj ĉirkaŭ la montrotabloj de librejo aŭ strata librostando profunde absorbitaj per legado de la poŝformataj bildrakontaj libroj. Ili estas ĉ. 15 centimetrojn longaj kaj 10 centimetrojn larĝaj. Ili havas allogajn, brilkolorajn kovrilojn kaj sur ĉiu paĝo de ili estas bildo kun klarigo. Ili estas verkitaj en simpla lingvo, kiun scipovas legi eĉ tiuj kiuj scias nur ĉ. 1,000 ideografojn.

En la pasinteco ili estis simple rigardataj kiel libroj por infanoj kaj enhavis nur infanajn aŭ supoze infanajn rakontojn. Ankoraŭ nun troviĝas specialaj bildrakontoj por infanoj—kvankam la enhavo de ili jam ŝanĝiĝis fundamente—sed en tiu ĉi formato presiĝas ankaŭ materialoj por plenaĝuloj kaj ilia legantaro ege vastiĝis inter la pliaĝuloj. Ili jam disvastiĝis malproksimen de la urbaj librostandoj. Hodiaŭ vi povas ilin trovi en vilaĝaj kluboj, en legĉambroj de fabrikoj kaj minejoj, en la barakoj kaj bivakoj de la Popola Liberiga Armeo kaj en la tendetoj de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj en Koreio...fakte ĉie, kie infanoj kaj plenaĝuloj lernas legadon.

De kiam la unua aperis antaŭ ĉirkaŭ kvardek jaroj en Ĉinio jam eldoniĝis miloj da bildrakontaj libretoj. La ŝato kiun ili ĝuas ĉe vasta publiko estas sendube pro tio ke "la bildoj mem rakontas". La plej bonaj el ili estas en klara skizo aŭ en akraj lumoj kaj ombroj kaj donas kompletajn rakontojn ke ili povas esti komprenataj preskaŭ sen la akompanantaj tekstoj. Ili iom similas al serio da bildoj el kino-filmo. Kelkaj el la lastatempe eldonitaj bildrakontaj libretoj fakte konsistas el bildoj el nuntempaj filmoj kaj donas la filmrakonton en kunpremita formo.

Antaŭliberigaj Bildrakontaj Libretoj

Kelkaj el la unuaj bildrakontaj libretoj baziĝis sur rakontoj el la antikvaj ĉinaj klasikaj literaturaj verkoj. Incidentoj el "*Akvorando*"*, la fama kaj stimula rakonto pri kamparana ribelo kontraŭ la imperiestro, aŭ *La Tri Regnoj*** estis kaj estas ĉiam popularaj. La bildrakontaj libroj populariĝis ĉi tiujn klasikaĵojn inter legantoj

* "*Akvorando*" (aŭ "*Ĉiuj Estas Fratap*") estas unu el la plej eminentaj klasikaj noveloj de Ĉinio. Ĝi estas verkita de Ŝi Naj-an de la 14a jarcento en la dinastioj Jŭan kaj Ming. Ĝi rakontas pri kamparana revolucia batalo sub la gvido de Sung Ĝiang kontraŭ Sung-dinastio.

** "*La Tri Regnoj*" estas historia novelo pri la periodo inter 220 kaj 264 p. K.

kiuj ankoraŭ ne povis legi grandajn originalojn. Kelkaj el ĉi tiuj unuaj bildrakontoj estis originale verkitaj por malkaŝi la malluman realon de la malnova tempo... kaj iliaj aŭtoroj suferis neeviteblan persekutadon sub la manoj de la militaristoj, Kuomintangaj reakciuloj kaj japanaj imperiistoj kiujn ili atakis aŭ rekte aŭ sugeste.

En 1916 kiam la unua militaristo Jŭan Ŝi-kaj establis sian diktatorecon en Pekino, iu artisto verkis bildrakonton titolitan *La Historio de Simio-registaro*. En la maldike vualita satiro li pentris Jŭan kiel simion kun krono imite al homo. (En la ĉina lingvo la ideografo por simio estas prononcata kiel Jŭan). La paskvilo tuj estis malkovrita de la furioza Jŭan, kiu ordonis aresti la artiston kaj malpermesi la libreton.

Bildrakontoj kiuj adoptis rakontojn de progresaj modernaj noveloj ankaŭ estis verkitaj antaŭ la liberigo, sed malmultaj vivis longe. Ili estis malpermesataj kaj la eldonaĵoj konfiskitaj de la reacia Kuomintangaj registaro. Iu artisto verkis bildrakonton pri la historio de la Dua Mondmilito. Ĉar ĝi enhavis portreton de la popola gvidanto, Maŭ Ze-tung, Kuomintango malpermesis ĝian disvendon.

Tial, kvankam kelkaj el la antaŭliberigaj bildrakontoj estis bonaj progresaj produktaĵoj, tamen plejparto el ili estis peze ŝarĝita de la ideologia balasto de feŭdismo. La plej malbonaj propagandis superstiĉaĵojn, laŭdis efektive banditecon, estis ofte obscenaj kaj havis aliajn neprogresajn karakterizaĵojn kontraŭ la interesoj kaj la perspektivo de la popolo.

La Kuomintangaj reakciuloj kompreneble ne preterlasis tiun ĉi rimedon por disvastigi sian obskurantisman ideologion. Estas ne mirinde, ke sub Kuomintango la senskrupulaj librovendistoj estis permesataj importi la famaĉajn "comics" (komikaj bildoj) de Usono kun ilia propagando pri perforto kaj seksaĵoj. Kuomintango klopodis allogi aŭ perforte devigi la artistojn pentri kontraŭkomunistajn bildrakontojn por ĝi, sed ĝi renkontis absolutan rifuzon.

Post Liberigo

La bildrakontaj libroj estis radikale reformitaj post la liberigo. La plej bonaj el la malnovaj konserviĝis. Novaj elementoj karakterizataj de la Novdemokratio aperis en ili.

La amplekso de la bildlibroj ekspansiis en enhavo kaj influo senkompara en la pasinteco. Depost la liberigo, multe altiĝis la kultura nivelo de la popolamasoj. Dekoj da milionoj jam scipovas aŭ estas lernantaj legi. Lastvintre ĉirkaŭ 50 milionoj da kamparanoj partoprenis vintrajn lerngrupojn dum la Popola Liberiga Armeo instruis legadon al dekoj da miloj el siaj batalantoj. Pli granda bezono de bildrakontaj libroj prezentiĝas ol iam ajn. Tial ilin plene adapti al ilia nova

grava rolo kiel la popola populara literatura legaĵo fariĝis urĝa tasko. La gvidantaj artistoj ilin produktantaj konsciigis pri la grandega graveco de la laboro kiun ili faras—la popularigo de literaturo kaj arto por la infanoj, por la laboristoj, kamparanoj kaj popolaj batalantoj. La speciala studo farita de la artistoj post la liberigo pri la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jen'an* de Prezidanto Maŭ Ze-tung donis apartan emfazon al tiu ĉi perspektivo de ilia laboro. La artistoj organizis specialajn seriojn da diskutoj por reformi la bildrakontajn librojn ke ili konvenu al nuntempaj bezonoj.

Guste sub tiaj cirkonstancoj la Asocio de Bildrakontaj Artistoj fondiĝis en januaro, 1950 en Ŝanhajo, kiu estis la gvida centro por la eldonado de la libretoj. Speciala studa kurso estis samtempe organizita kaj ĝi akiris la helpon de nombro da famaj modernaj artistoj kiel Ĉen Jan-ĉjaŭ kaj Mi Gu, por helpi la artistojn de la malnova skolo altigi siajn politikan kaj artistan nivelojn. La taskoj de la bildrakontaj artistoj ankaŭ estis diskutataj ĉe la Unua Kongreso de Verkistoj kaj Artistoj en Ŝanhajo. 1950 kaj ĉe la Unua Landa Konferenco pri Eldonado okazinta en Pekino en la sama jaro. Tiuj ĉi diskutoj donis novan direkton al la laboro de bildrakontaj artistoj, vastigante iliajn horizontojn kaj legantaron.

La novaj bildrakontaj libroj jam tute liberigis el feŭda superstiĉo kaj aliaj malprogresaj tendencoj. Ili prenas siajn temojn el la grandaj klasikaj aŭ elstaraj literaturaj verkoj nuntempaj aŭ originale pritraktas la novajn personojn kaj aferojn de popola Ĉinio. Inter la plej ŝatataj verkoj pri aktualaj temoj *Ĝaŭ Ĝan-kŭej* kaj *Laborheroo* pripentras modernan fabrikon vivon; *Agrara Reformo*, *Sunbrilo sur Sanggan-rivero* (baziĝanta sur la Stalin-premi-gajninta verko de Ding Ling) kaj *La Tuta Familio en Produktlaboro* priskribas la vivon de la kamparanoj. *Batalheroo Ŭej Laj-gŭo* kaj la *Liberigo de Hajnan-insulo* priskribas vivon en la unuoj de la Popola Liberiga Armeo. Multaj aliaj rakontas la vivon de virinoj kaj gejunuloj en nova Ĉinio. Ĉi tiuj estas ĉiuj vaste legataj verkoj. Kelkaj jam produktis popularajn heroojn nun konatajn tra la tuta lando. Entute ili priskribas la veran karakteron de la ĉina popolo, ilia amo al laboro, iliaj altaj idealoj, ilia patriotismo, la entuziasmo kaj heroismo en ilia lukto kontraŭ agresado kaj subpremo kaj ilia firmdecida sindediĉo al la afero de paco.

Kelkaj Bonaj Ekzemploj

Tiuj ĉi novaj bildrakontoj daŭrigas la plej bonajn tradiciojn de la malnovaj. Sed pli bona redaktado, pli bona literatura kunlaboro, pli bonaj materialaj kondiĉoj por la artistoj jam eliminis la fuŝproduktecon de la pasinteco. Aparta atento estas donata al la integreco de intrigo kaj personoj, al klareco de bildoprezentado same kiel al taŭgeco de fono kaj duagrada personoj kaj al unueco de bildo kaj teksto.

Tio ĉi jam ne plu estas kolportista artaĵo—tamen ili estas ankoraŭ vendataj tre populare. Multaj el ili estas en la kolektista listo kaj trovas

* “Plum-letero”—komunikaĵo al kies koverto oni almetas kok-plumon por indiki ke la sciigo estas tre urĝa kaj neniel prokrastebla.

lokon en multaj bibliotekoj de instruituloj kaj artistoj. Ili fariĝis ne nur libertempa legaĵo por la popolamasoj sed ankaŭ grava edukilo. La bildrakonto *Tridek Jaroj de la Ĉina Komunista Partio* de Ĝaŭ Feng-ĉŭan, Gu I-ĝoŭ kaj U Zing-bo jam fariĝis populara referenca libro por la studo pri la ĉina revolucio, kaj pli ol 5,000,000 ekzempleroj vendiĝis en la unua jaro.


La nombro de novaj bildrakontaj libroj multege kreskis. Disvendo multiĝis. En la du jaroj de 1950 ĝis 1952, preskaŭ 2,000 bildrakontaj libroj eldoniĝis en Pekino, Ŝanhajo kaj Nordorienta Ĉinio kaj la eldonnombro estas entute pli ol 20 milionoj da ekzempleroj. Kelkaj el ili, kiel *La Plum-letero*,* *S-ro Dungŭo* kaj *Ŭang Ŝjoŭ-lŭan* ĉiuj de la artisto Ljoŭ Ĝji-ju, ĝuas vastan popularecon.

“La Plum-letero” baziĝas sur rakonto de Hŭa Ŝan. Ĝi priskribas kiel dum la Rezista Milito kontraŭ la Japana Agreso, Haj-ŭa, ŝafpaŝtista knabo, vilaĝa

El Plum-letero

Supre: Haj-ŭa kaŝas la plum-leteron sub la dikan ŝafovoston.

Sube: Haj-ŭa fiksrigardas la japanan diablon.





El Sinjoro Dunggŭo

Supre: Sinjoro Dunggŭo kaŝas la lupon en sian librosakon.

Sube: Post la forpaso de la ĉasistoj, la lupo eliris el la librosako kaj eksentas malsaton kaj deziras formanĝi sian savinton.

KURANTAJ AFEROJ

Hinda Artista Delegacio en Ĉinio

La Hinda Artista Delegacio el 29 membroj, kun Sachin Sen Gupta kiel la ĉefo, jam alvenis al Ĉinio kaj vizitis la grandajn urbojn de la lando.

La Delegacio, organizita de la Tuthindia Pac-Konsilo, konsistis el famaj artistoj el ĉiuj partoj de Hindio. Ĝi alvenis pro la invito de la Ĉina Packomitato. Prezentoj estis okazigitaj en Pekino k. a. grandaj urboj kaj estis entuziasme akceptataj de vastaj aŭdantoj. La hindaj gastoj ankaŭ vizitis multajn pejzaĝajn kaj historiajn lokojn kaj aliajn interesajn ejojn de la lando. Dum ĝia restado en Pekino, Prezidanto Maŭ persone akceptis la Delegacion kaj ĉeestis unu el la prezentoj.

La vizito de la Delegacio al Ĉinio plintimigos la amikecon kaj kulturen interŝanĝon inter la hinda kaj la ĉina popoloj, kaj ankaŭ plintimigos ilian kunlaboron en la luktado por paco en Azio kaj en la tuta mondo.

Junpionira ĉefo, sin proponis por servi al la populaj fortoj. La centra epizodo rakontas, kiel li transdonas "plum-leteron" por la komandanto de gerila unuo, batalante sprite, rimedoplene kaj kuraĝe kontraŭ la invadantoj.

"S-ro Dunggŭo" estas alia malgranda majstrajo de ĉi tiu artisto. Ĝi bazas sin sur "La Lupo de Gungŝan", fabelo de la periodo de la Militantaj Regnoj (403-221 a. K.) rakontanta pri Dunggŭo, bonkora, longe suferanta maljunulo, kiu volis vivi pacan vivon kaj kontraŭis al milito kaj buĉado de ajna vivantaĵo, aŭ homo aŭ besto. Sed Dunggŭo ne scias la diferencon inter agreso kaj defendo kontraŭ agresanto kaj li eĉ pensis ke lupo estas bona animalo. Kiam li savis iun lupon for de la ĉasistoj, li estis surprizita ke la lupo sin turnis kontraŭ li kiam la danĝero forpasis. La filozofado de Dunggŭo havis nenian efikon sur la besto kaj li estis savita de morto nur dank' al la bonŝanca reveno de la ĉasistoj, kiuj volis forigi de la regiono ĉi tiun minacon al la paca vivo de la vilaĝanoj. Dunggŭo fine komprenis kiel eraraj estas liaj ideoj pri la naturo de lupoj, kiam li vidis la restaĵojn de homkorpoj en la stomako de la lupo.

Tiajn novajn bildrakontojn oni prenis kiel ekzemplojn por montri kia devas esti bona verko en ĉi tiu kampo. Ili havas konsiderindan influon sur aliaj artistoj. Ili proviĝis facile kompreneblaj kaj ege amuzaj. Krome, ili sukcesis aligi la leganton al la flanko de siaj herooj, la fortoj de justeco kaj progreso, kiaj Haj-ŝa aŭ Ŭang Ŝjoŭ-lŭan, la kamparana knabina laborheroino kiu kreskigis riĉajn rikoltaĵojn kiam ŝia edzo estis for en la Popola Armeo, kaj mobilizi lian malestimon kaj justan malmemon kontraŭ la kanajloj, la perfiduloj, Kuomintangaj reakciuloj aŭ japanaj invadantoj.

La bildrakontaj libretoj de nova Ĉinio havas brilan estontecon antaŭ si. Se la popolo postulas pli multajn librojn kaj pli bonajn librojn, la artistoj mem estas nun politike, teknike kaj arte pli kompetentaj respondi tian defian postulon.

"La bildrakontoj ne havos siajn Tolstoj kaj Flaubert, tamen... povos havi tiajn grandajn pentristo-majstrojn kiaj Michelangelo kaj Da Vinci —tio estis la espero tenata de Lu Sin, la plej granda moderna verkisto de Ĉinio.

Preĝejoj en Ŝanhajo

La nombro de preĝejoj en Ŝanhajo, la plej granda urbo en Ĉinio, pligrandiĝis depost liberigo en majo 1949. Sur unu el la ĉefaj stratoj de la urbo, granda baptista preĝejo estis finkonstruita lastjare kaj malfermita al la preĝejoj-vizitantoj. Je la fino de 1952, troviĝis ĉirkaŭ 10 diferencaj protestantaj sektoj en Ŝanhajo, reprezentataj de 139 preĝejoj, ne enkalkulante iliajn diversajn branĉajn preĝejojn. Depost liberigo, ĉeestantaro estas kontinue pligrandiĝanta: ekzemple, en la antaŭe de usonanoj irigata *Community Church*, ĉeestantaro kiu iam malplimultiĝis eĉ ĝis 70, nun meznombro superas 200 ĉiudimanche.

Nova Unuiĝa Teologia Seminario en Nankino

Ding Gŭang-ŝjun*

Por tiuj en la Okcidento kiuj fariĝis viktimoj de propagando pri "persekutado al religio" en nova Ĉinio, estus malfacile kredi ke povas ekzisti en tiu ĉi lando ia teologia edukado. Tamen, la fakto estas ke teologiaj institucioj—kaj Rom-katolikaj kaj protestantaj—troviĝas kaj funkcias en Ĉinio, sub la aŭspicio kaj per la subtenado de ni ĉinaj kristanoj mem.

Tie ĉi en Nankino ni estas nun finantaj la unuan semestron en la nova Nankin-a Unuiĝa Teologia Seminario. Tiu ĉi seminario estas la kuniĝo de 11 pli malgrandaj protestantaj teologiaj kolegioj en Orienta Ĉinio, inkluzive de la Fukien-a Unuiĝa Teologia Kolegio en Fuĉoŭ, la Centra Anglikana (aŭ Episkopa) Teologia Lernejo en Ŝanhajo, la Ĉina Baptista Teologia Seminario en Ŝanhajo, la Nordĉinia Teologia Lernejo de Teng-gubernio en Ŝantung-provinco, kaj la Teologia Lernejo en Ĉjilu-Universitato en Zinan, Ŝantung.

La 101 lernantoj en tiu ĉi kunfondita instituto en Nankino estas sur tri stud-niveloj, t.e. postdiplomiga, universitata kaj supera-mezlerneja. 31 lernantoj estos diplomitaj je la fino de la unua semestro. Ili jam ĉiuj ricevis invitojn esti helpaj pastroj aŭ fari aliajn religiajn laborojn en urboj aŭ kamparaj regionoj. Tio ĉi estas klara indiko ke religio normale kontinuas en Ĉinio hodiaŭ.

Oni eble demandas: "Sed ĉu estas novaj studentoj kiuj eniras la teologiajn instituciojn?" Ĝis nun ni jam havas 97 petojn por enskribo. Bedaŭrinde, nia nuna kapacito estas ne sufiĉe granda kaj ni ne povas enlasi ilin ĉiujn tuj.

En nia lernprogramo, kursoj pri la Malnova kaj Nova Testamento estas esenca parto. Egala atento estas donata al Sistema Teologio. Samtempe, ni ankaŭ havas kursojn pri Eklezia Historio, Historio de Dogmo, Biblia Arkeologio, Pastra Teologio, Eklezia Muziko, Lingvoj ktp. La lingvaj kursoj estas ĉina, greka, hebrea, kaj angla.

Kristanoj tra la tuta mondo ja bone scias ke, mal-unueco inter la kristanoj kaj inter la ekleziaj grupoj estas responda pri la pli granda parto de nia malsukceso en la evangelia laboro. Dumlonge ŝajnis al ni kvazaŭ estus tute neeble ilin unuigi, kiom ajn da bonaj intencoj oni povu dediĉi. En la pasinteco, kuna komitato reprezentanta du teologiajn skolojn de la sama urbo en Ĉinio, laboris 15 jarojn kun la celo ilin unuigi, sed ne atingis ian senteban rezultaton.

Hodiaŭ, en nova Ĉinio, la tuta atmosfero jam ŝanĝiĝis. Troa memfideco aŭ malmodesteco fariĝis eksmoda. Tiel, la 11 seminarioj en Orienta Ĉinio povis akiri sian unuecon sur bazo de plena memvolo

kaj en tempdaŭro relative mallonga, treege ĝojigante la amason de kristanoj, kiuj preĝadis ke tio okazu.

En tiu ĉi nove organizita seminario partoprenas 15 protestantaj sektoj. Al la specialaj karakteroj kaj postuloj de ĉiu sekto estas donata ĝusta respekto ne sole rilate la lernprogramon sed ankaŭ la aranĝon de preĝoj kaj ĝenerala komunuma vivo en la seminario. Ekzemple, dum plejmulto de la diservoj estas universala por ĉiuj, aparta kapelo estas speciale starigita por la anglikanoj (aŭ episkopanoj), ke ili povu havi sian propran celebron de sankta komunio je dimanĉoj kaj sanktaj tagoj.

Ĉar nia seminario estas diferenca de aliaj altedukaj institucioj en Ĉinio pro tio ke ĝi estas tute religia, kaj ne registara, institucio, ĝi estas financata sole de la kristanoj. Tamen, la seminario estis organizita kun la scio kaj bona volo de la popola registaro, konforme al la principo de libereco de religio, kiu estas garantiata per Artikolo 5 de la Komuna Programo de la lando.

La eklezio estas libera en Ĉinio. Oni ne postulis nin ŝanĝi eĉ unu grajnon de la historia kristanisma kredo, kiu estas tiel same altvalora al ni ĉinaj kristanoj, kiel ĝi estas al la tutmondaj kristanoj. Dimanĉaj diservoj en iaj preĝejoj estas bone vizitataj kaj la spirita nivelo de niaj membroj estas alta. Ke tia seminario, kia la nia, fariĝas ebla kaj necesa, tio povas okazi nur kiam la eklezio estas viva kaj libera.

Multaj kristanoj-gejunuloj opinias, ke esti pastro kaj fari eklezian laboron estas maniero por ili servi al Dio kaj la popolo. Hodiaŭ, kristanaj pastroj estas laborantaj en ĉirkaŭaĵo de moralaj sano kaj forto. Ili povas sin okupi je sia morala kaj spirita tasko kun tute trankvila konscienco, ĉar, hodiaŭ, ili havas la liberecon sin dediĉi tutkore al la luktago por paco, demokratio, libereco, homa digno kaj ĉiuj tiuj objektoj, kiujn la kristana kredo postulas de la homara komunumo.

En la pasinteco, ekleziuloj kun vere sankta spirito nepre suferis konsciencan doloron en si, ĉar ili tiutempe estis devigataj deteni sian voĉon pri ĉiaj maljustaĵoj. Estis risko eĉ esprimi ian simpatian al la pacmovado, kvankam ili konvinkigis, ke tio, kion la mondo bezonas, estas paco.

Sed, hodiaŭ, ni povas tute libere eldiri niajn opiniojn kiel kristanoj. En nova Ĉinio, libereco de religio signifas multe pli ol registara tolerado de religio. Ĝi ankaŭ inkludas la liberecon de la kristana konscienco. Kaj pro tio, esti predikanto de la evangelio fariĝas vera ĝojo.

La eklezio en Ĉinio havas unikan rolon por ludi en tiu ĉi nova komenco de nia lando. Ĝi plenumos tiun ĉi rolon ne sole per ĝia preĝado kaj ĝia laboro de amo, sed ankaŭ per tio, ke ĝi sin dediĉas al la afero de mondpaco. La eklezio en Ĉinio hodiaŭ sentas la internan impulson de konscienco, ke ĝi devas alvoki al siaj fratinaj eklezioj eksterlandaj ke ili serioze konsideru pri sia starpunkto rilate al la afero de mondpaco. Paco ne povas esti apartigita el la kerno de tiu kredo, kiun la eklezio konfesas.

* Ding Gŭang-ŝjun, unu el la ĉinaj pli bone konataj junaj kristanaj laborantoj, estas anglikana (episkopa) pastro kiu estas nun estro de la nova Unuiĝa Teologia Seminario en Nankino. De 1947 ĝis 1951 li estis sekretario de la Monda Studenta Kristana Federacio, vizitante preĝejojn kaj universitatojn en Eŭropo kaj Suda Ameriko.

Asuraĝi

Legendo de Ji-nacio en Sikang-provinco



En antikva tempo vivis en Daljang-montaro iu maljunulino, kies nomo estis Alumuĝi. Ŝi havis filon kaj filinon. La filo nomiĝis Asuraĝi kaj la filino—Ag.

Asuraĝi estis tre fama en Daljang-montaro, ĉar li sciis ĉion. Liaj bovoj kaj ŝafoj estis ĉiam pli grasaj ol la alies kaj liaj kampoj ĉiam pli abunde produktis. Cetere li donis sian fervoran helpon kiam io okazis al iu ajn. Troviĝante en malfacilaĵo, oni diris senescepte: “Mi iru al Asuraĝi, li certe donos al mi bonan konsilon!”

Ĉiuj amis Asuraĝi'n kaj respektis lin kvazaŭ pliaĝulon.

Sed, je la miro de ĉiuj, Asuraĝi ekmalĝojiĝis.

Tiam ĉiuj aliaj malĝojiĝis kune kun li.

Kiel ankaŭ Asuraĝi povis malĝojiĝi? Kaj pro kio?

Neniu povis diveni lian sekretan penson.

Iun tagon la tuta familio de Alumuĝi forlasis sian hejmon kiel kutime antaŭ tagiĝo. La patrino, kunportante fosilon, iris por fose turni la teron, dum la gefratoj rajdis sur ĉevaloj pelante la bovojn kaj ŝafojn al la paŝtejo.

Daljang-montaro kuŝis kiel senfine granda kombilo. La gefratoj iris laŭ la kombila dorso. La montbrancoj etendiĝis dekstren kvazaŭ dentoj de la kombilo. Iuj el la grandaj kombildentoj estis plene kovritaj de rozkolora floretaro de poligono, sur aliaj densa verdaĵo de pinoj kaj cipresoj formis longan tegmantan egon freŝe verdan, kaj ankoraŭ aliaj ornamis sin per brilverdaĵo, ĉielbluaĵo, smeraldaĵo, laktoblankaj... ĉiuspecaj rokoj kvazaŭ juvel-ekspozicio; kelkaj el ili aspektis kiel kurantaj sovaĝaj bestoj, aliaj kiel profunde dormantaj junulinoj. Kiam la leviganta suno prilumis iliajn duone travideblajn korpojn, ili rejetis sennombrajn blindigajn brilojn.

“Ho, file! patrino,

Jam ne ploru,

Jam ne ploru plu!”

Ag ekkantis plengorge sur sia ĉevalo. Asuraĝi sulkis la brovojn, ĉar la kantvoĉo de Ag malhelpis lian meditado!

Rimarkinte la malbonan humoron de la frato, ankaŭ Ag jam perdis sian kantemon.

La brutaro ekvigliĝis kiam ĝi transgrimpis montokreston. Maljuna bovo muĝis plurfoje al la ĉielo, iom svinginte la voston, kuris rekte malsupren laŭ la deklivo kaj ankaŭ la ŝafaro kapriolis post ĝi. Ag kriis kun entuziasmo: “Rapidu, frato, ĉi tie la herbaro neniam estos elĉerpebla por la brutaro!”

Ĉe la montpiedo troviĝis larĝa ebena valo. La freŝa herbejo aspektis kiel verda tapiŝo. Losu-rivero kun argenta brilo alrapidis kantante de la okcidenta montpiedo, faris kelkajn kurbiĝojn serpente tra la valo kaj

ree kurante forfluis tra la orienta pasejo. Inter la arbustaroj sur ambaŭ bordoj, beroj elrigardis kiel flame ruĝaj globetoj el agato.

Sed Asuraĝi skuis sian kapon kaj diris: “Ĉio ĉi neniel povas forigi mian malkvieton!”

La fratio donis frapon al sia ĉevalo kaj kuris antaŭen, dum Asuraĝi sidis malvigle sur la ĉevalo meditante kaj lasis la rajdbeston paŝi nerapideme.

Enpensigante li trovis ke la palpebroj peziĝas iom post iom, sed ĝuste en tiu momento li ekaŭdis iun voĉon lin vokanta:

“Ho, plej saĝa homo en la mondo, kio igas vin tiel malĝoja? Ĉu via malkontento venas de tio, ke vi havas tro malmulte da bovoj kaj ŝafoj? Ĉu vi trovas ke via tero estas ne sufiĉe fekunda? Aŭ vi soifas je bela kaj lerta edzino?”

Asuraĝi levis sian kapon kaj vidis, ke antaŭ li staras maljunulo. Sub lia malhele blua mantelo elrigardis portepo plektita el argentaĵo fadenoj kaj ĉe la maldestra orelo brilis orflava sukkena globeto.

Asuraĝi skuis sian kapon kun sulkitaj brovoj kaj respondis: “Ne, ĉio ĉi ne povus min malĝojigi! Mi malĝojas por la popolamaso!”

“Diru al mi kia afero ĝi estas, eble tio donos al vi ian helpon.”

Post ioma pripenso Asuraĝi diris: “Bone, mi dirus al vi. La ĉielo dotis min per saĝa spirito por ke mi sciu kiel vivi, sed ekzistas ankoraŭ tre multaj, kiuj ne scias kiel vivi. Mi kredas, ke mi havas la devon transdoni mian saĝon al la aliaj, sed mi havas nur unu buŝon, kiam mi parolas ĉe la suda flanko de la monto, la homoj de la norda flanko ne aŭdas. Cetere, eĉ tiuj, kiuj aŭdas, eble tute forgesos kion mi diras! Tial mi esperas akiri ian altvaloraĵon, kiu povas konservi mian parolon tiel, ke oni povu ĝin aŭdi kie ajn kaj kiam ajn. Sed kie mi trovas tiun altvaloraĵon?”

Tion aŭdinte la maljunulo diris ridegante: “Ĉu tio estas la kaŭzo de via malĝojo? Nun mi diru al vi. La ĉielo sendis min al vi ĝuste por tio, ke mi eltrovu kio vin malĝojigas. Se la kaŭzo estas tio, kion mi menciis antaŭe, mi tiam forprenu de vi la dotitan saĝon. Ĉar permesi egoiston havi saĝan spiriton faros al la mondo nenian bonon. Sed vi malĝojas por la popolamaso, estas

tute alia afero. Iru serĉi Aĝibunung'n en la arbarego trans Lungtoŭ-monto (Drakokapa Monto), li havigos al vi kion vi deziras."

Asuraĝi ankoraŭ volis daŭrigi sian informiĝon, sed la maljunulo jam malaperis. Freŝa ventblovo vekis lin kaj li ektrovigis, ke li sonĝis. Sed la vortoj, kiujn la maljunulo parolis antaŭ foriro, ankoraŭ resonis en lia kapo. Post iom da hezito, li desaltis de la ĉevalo kaj kuris al Lungtoŭ-monto, profitante la okazon, kiam la fratino ne atentis.

Transirinte Lungtoŭ-monton, li alvenis al la arbarego.

La arbaro estis tiel vasta, ke oni ne povis vidi ĝian limon. La sunradioj, kiuj boris siajn vojojn tra la interplektita foliaro, kvazaŭ brilantaj fadenoj, ĵetiĝis oblikve sur la teron kovratan de falintaj folioj. En la arbaro regis silento kiel en la nokto. Nur la skarabetoj eligis mallaŭtan susuron dum la rampado sur la tero.

Subite iu kristala voĉo kriis al li: "Ĉu estas vi, Asuraĝi? Kion vi deziras tie ĉi, plej saĝa homo en la mondo?"

Asuraĝi estis haltigita de la neatendita voĉo dum sia rapidema irado. Li iom trankviligis sin kaj ĉirkaŭrigardis. La ĉirkaŭaĵojn regas kompleta silento kaj nenio troviĝis csepte de la arbegoj, musko kaj falintaj folioj.

Refoje aŭdiĝis la kristala voĉo: "Mi estas ĉi tie, —kien vi rigardas?" Ĉi tiun fojon Asuraĝi aŭdis klare, ke la voĉo venis de super lia kapo. Li rigardis kapleve: jen sur branĉo ĝuste super lia kapo staris bela feobirdo kun atlaseca plumaro kaj balancis la kapon al li. Ja estis tiu birdo, kiu alparolis lin.

"Bela birdreĝo," diris Asuraĝi, "mi venas serĉi Aĝibunung'n, ĉu vi povus min sciigi, kie li troviĝas?"

"Ho, vi serĉas min. Sed kion vi deziras?" diris Aĝibunung, la bela birdo kaj, etendante siajn flugilojn, venis malsupren antaŭ lin.

Aŭdinte ke ĝi estas Aĝibunung, Asuraĝi ekĝojis kaj rakontis al ĝi sian intencon. Aĝibunung elaŭskultis kaj kapbalancis: "Bone, ĉar vi serĉas min por la popolamaso, mi certe donos al vi mian helpon. Nun sekvu min!"

Aĝibunung malfermis la ĉielarko-similajn flugilojn kaj flugis antaŭ li. Asuraĝi sekvis tuj poste. La arbegoj rekte starantaj kaj ŝvingantaj siajn manojn bonvenigis lin kvazaŭ aro da fortaj, afablaj avoj.

Ili vagadis tre longe inter la arbegoj kaj venis fine al sablejo, kiu estis ronda kiel plenluno, ebena kiel akvo kaj blanka kiel arĝento.

Aĝibunung haltis, ordonis Asuraĝi'n sidiĝi kaj diris: "Kraĉu salivon!"

Asuraĝi kraĉis. La salivo etendiĝis kiel nerompebla fadeno. Aĝibunung kaptis unu finon de la salivo per sia beko kaj komencis rampi tra la sablejo. Kie ajn ĝi trapasis rampante, tie ekaperis diversformaj skribsignoj faritaj el salivo kaj Asuraĝi tuj kopiis ilin sur sia larva—lana mantelo.

Preskaŭ duona tago pasis, kiam Aĝibunung ĉesis rampi dirante: "Nu, sufiĉe por hodiaŭ. Venu ĉiutage, mi helpos vin ĝis kiam Losu-popolo havos sufiĉan skribsignaron. Tamen bone memoru la ĵenan kondiĉon: se vi malkaŝus nian agadon al aliaj, mi tuj ĉesigos mian helpon al vi!"

Kiam Asuraĝi revenis al la paŝtejo, lia fratino jam pelis la brutaron hejmen. Li postiris rapideme kaj atingis ŝin mezvoje. La fratino diris kolere:

"Atendu, mi nepre reguligos la kontojn kun vi hejme. Vi metas la tutan ŝarĝon sur min, tion mi ne konsentas."

Por plenumi la kondiĉon proponitan de Aĝibunung, Asuraĝi diris nenion. Sed la fratino kredis ke li ne povas sin pravigi, tial ŝi daŭrigis la kverelon dum la tuta vojo kaj apenaŭ ĉesis kiam ili alvenis hejmon.

Post tiu okazo, Asuraĝi iris al la arbaro ĉiutage, kaj la malkontenteco de la fratino ĉiutage kreskis. Iun tagon ŝi decidis rakonti ĉion al la patrino, ĉar ŝi timis, ke la patrino konsiderus la laboron, kiun ŝi faris sola, faris ankaŭ ŝia frato.

"Panjo!" diris Ag, "via filino estas tiel malfeliĉa! Ĉiutage mi sola paŝtis la brutaron, dum Asuraĝi nur amuzis sin aparte kaj eĉ unu minuton li ne volis zorgi pri la ŝafoj!"

La maljunulino Alumuĝi demandis malkredeme: "Kien li iris, se li ne zorgis pri la ŝafoj?"

"Kiu povas diri kien li vagis! Nur tuttage oni ne vidis lin," respondis Ag.

"Klaĉema knabino!" severe diris la patrino. "Estu pli pacema! Vi perdus nenion, se vi laborus pli multe ol alia. Mi forbatos vian langon, se mi aŭdus vin alifoje akuzi kalumnio!"

Ag ploris la tutan nokton. Ŝi decidis malkovri atestojn pri la ludemo de sia frato, alie la maljustaĵo, kiun ŝi suferis, estos neniam forigebla.

Tiun tagon dum la paŝtado, Ag observis atente la agadon de Asuraĝi. Kiam li desaltis de la ĉevalo, ŝi ankaŭ deĉevaliĝis. Ŝi iris ŝtele post Asuraĝi trans Lungtoŭ-monton, en la arbaregon. Ŝi kaŝis sin malantaŭ granda arbo por observi kion Asuraĝi faros.

Kiam Aĝibunung estis rampanta kun la salivofadeno en la beko, ekaŭdiĝis krio: "Asuraĝi, jen atestajo falas en mian manon!"

Asuraĝi stultiĝis de la neatenditaĵo. Antaŭ ol li povis kompreni kio okazis, Aĝibunung jam levis sin kaj flugis ĉirkaŭ la sablejo dirante: "Kia hontindaĵo! Mi ne antaŭvidis, ke vi, Asuraĝi, estas tia malhonestulo. Ĉar vi ne obeis mian admonon, mi ankaŭ ĉesas vin helpi!" Finparolinte ĝi malfermis siajn ĉielarko-similajn flugilojn kaj pafis sin en la firmamenton, eĉ ne donante al Asuraĝi la okazon por sin senkulpigi.

Asuraĝi finnotis senkonsile la nefinitajn skribsignojn kaj forlasis mute la arbaron. Post tiu okazo Aĝibunung ne revenis plu por helpi lin. Tial Ji-nacio neniam havis skriblingvon sufiĉan por la ĉiutaga uzo, antaŭ ol Prezidanto Maŭ alsendis specialistojn por helpi ĝin krei oportunan kaj sufiĉan novan skriblingvon.

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo

Redakcio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio
Administracio: 38 Suchow Hutung, Peking, Ĉinio

KVARA JARO N-RO 9

EN H A V O

Heroa Koreio, Bela Koreio

Digo de Kunbatalanta Amikeco

Tra Nordokcidenta Ĉinio

En la Primitiva Arbaro de la Granda Ĥingan-montaro

Amikeco

Antaŭ Ĉio Lasu Min Vidi Prezidanton Maŭ

Gravaj Libretoj

Nova Unuĝa Teologia Seminario en Nankino

Asuraĝi



La Tibeta popolo, same kiel aliaj popoloj de Ĉinio, havas siajn specialajn, elegantajn, man-faritajn produktaĵojn. La lan-tapiŝoj estas unu el ili. En la temploj de la lamaoj, la hejmoj de la loĝantoj, la tendoj de la paŝtistoj kaj sub la seloj de bonaj ĉevaloj galopantaj sur la alta ebenajo oni ofte vidas diversspecajn, delikate teksitajn tapiŝojn kun brilaj koloroj kaj belaj desegnoj. Ili estas uzataj kiel plank-kovriloj, dorm-, sid-, apog- aŭ sel-kusenoj ktp.

La Tibetaj tapiŝoj estas faritaj el diverskoloraj lanoj. Iliaj formoj kaj grandecoj varias laŭ malsamaj bezonoj. Iliaj desegnoj estas mult-specaj kaj tre vivecaj, kaj tio elmontras la brilan artismon kaj saĝecon de la Tibeta popolo. La desegnoj ofte reprezentas tiujn



vidindaĵojn aŭ objektojn kiujn la popolo kutime trovas en sia ĉiutaga vivo, kiel nuboj, akvo, floroj, herboj, kaj kelkfoje leonoj aŭ drakoj kiuj simbolas religion. Oni ankaŭ utiligas diversajn, geometriajn figurojn, pliriĉigante la enhavon de la desegnoj. La fono estas ĉiam de malhela koloro kaj la figuroj havas pli brilan, belan koloron. Blanka koloro troviĝas inter la malsamaj koloroj, tiel formante elstaran kontraston.

Dum la pli ol du jaroj depost la paca liberigo de Tibeto, pro la plenumado de la korekta nacia politiko de Prezidanto Maŭ, la vivo de la Tibeta popolo fariĝas pli kaj pli bona kaj la metio de tapiŝoj ankaŭ akiras rimarkindan progreson. Ĝi iras sur evolua vojo neniam antaŭe ekzistinta, pliriĉigante la materian kaj kulturen vivon de la Tibeta popolo kiu loĝas sur la alta ebenajo en sudokcidenta Ĉinio kaj sin okupas ĉefe pri paŝtado.

Maldekstre supre: **sel-kuseno**

Maldekstre sube: **sid-kuseno**

Dekstre sube: **dorm-kuseno**

